

eLIBRO

Pär Lagerkvist

Mariamne



INKO

Pär Lagerkvist
MARIAMNE

El la sveda tradukis
Bertil Nilsson

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

Ĉi tiu eLibro ekzistas ankaŭ en presita versio. Aĉetu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (www.uea.org), ĉe via landa libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo

Al-fab-et-o,
Sten Johansson
Bergslagsgatan 14, 8 tr.
SE-602 17 Norrköping
Svedio
(alfabeto@esperanto.se)

ISBN 91-7303-052-X

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

DECEMBRO 2000

1

Kiam la granda reĝo Herodo vivis sur la tero, li estis potenca homo kaj alia homo same potenca eble neniam ekzistis. Almenaŭ li mem kredis tion. Kaj eble li pravis. Li estis bildo de homo, kies speco plenigas la teron, sed kiu iam estos viŝita for de ĝi kaj, se ni ĝuste komprenas, ne lasos memoraĵon post si. Sed nun ni lasu tion kaj rakontu pri lia sorto.

Li estis reĝo de la judoj, sed lia popolo ne amis lin. Parte pro lia granda malico kaj parte pro tio, ke li estis idumido kaj tial ne en ĝusta maniero cirkumcidita. Laŭ ilia moro nur parto de la prepucio estis fortranĉita. Liaj multaj malbonagoj kreskigis la malamon kontraŭ li dum lia tuta vivo kaj ĉiuj deziris, ke li mortu. En sia malico li tamen konstruigis templon por la Sinjoro, kiu laŭ pompo superis eĉ tiun de Salomono. Tio tre surprizis la judojn, sed malgraŭ tio, ke ili ne povis fornei la belecon de la templo, ilia malamo kontraŭ li ne malkreskis. Ili opiniis lin la plej kruela kaj plej malpia homo iam vivinta, feĉo de la homaro, kiu plenigis ilin per abomeno, naŭzo kaj timo. Tia estis la juĝo pri li kaj neniu povis nei, ke ĝi estas ĝusta kaj vera.

Kaj li amis Mariamne.

Malgraŭ tio, ke li naskiĝis en Jerusalemo, la dezerto estis lia

vera hejmlando, ĉar ĝi estis la lando de liaj prapatroj, kie ili ricevis sian animon. Kvankam nesciante tion, li portis la dezerton ene en si kaj foje sentis la grandan dezertecon, kiu venas el tio. Sed li ankaŭ posedis la sovaĝan ĝojon pri la vivo, kiu karakterizis lian popolon, ĝojon je perforto, sango, lukto, je mortigado kaj je plezuro mem vivi, kiun ĝi estigas, je fuĝantoj kaj vunditoj, je virinrabo kaj seksperfortoj kaj je ĉio, kion alportas la milito, kiam ĝi estas sukcesa kaj bone farata, je prospero, oro, potenco, unuvorte je la tuta vivo. Ankaŭ malsukcesoj — ankaŭ tiaj okazis al li — plenigis lin per plezuro, ĉar lia malamo kontraŭ la kulpantoj estis fortega kaj ekscitis lin ĝis furiozo, kiu, fermita en li mem, zorge kaŝita antaŭ aliaj, atendis okazon de venĝo kaj nova lukto. Sed malsukcesoj koncerne virinojn ne plenigis lin per plia vivplezuro, sed per la jam menciita dezerteco en lia interno kaj tio certe havis rilaton kun la malpleno kaj soleco en lia dezertanimo.

Lia korpo estis granda kaj iom peza kaj li havis iom krudajn vizaĝtraĵojn. Li eble ne estis bela viro, sed se oni unufoje vidis lin, oni jam ne forgesis. Almenaŭ lian rigardon oni ne forgesis, kvankam oni ne longe eltenis ĝin, ne pli longe ol necese. Ĝi estis danĝere serĉa, per ĝi li prijuĝis la homojn kaj li evidente ne ŝatis ilin. La okuloj estis brunaj kun kelkaj helaj makuletoj, iuj diris, ke li havas leonokulojn, tamen leonoj ne havas tiajn okulojn, sed multe pli palajn. Lia vizaĝkoloro estis flaveca, ankaŭ la lipoj iom flavecaj. Tio ne estis sana koloro, sed cetere li ŝajnis plena de forto kaj sano. Pro tio kelkaj kredis, ke li suferas de ia malsano kaj ke li baldaŭ mortos. Sed en tio ili miskredis, li ne mortis.

Ne havante ian ajn difekton, li tamen paŝis multe pli peze

per la dekstra piedo ol per la maldekstra. Li kredeble mem ne sciis tion, sed aliaj rimarkis kaj opiniis, ke li pro tio aspektas pli fortika kaj kvazaŭ malbonaŭgura, precipe se oni lin vidas de malantaŭe, kiam li rompis interparolon kaj foriras. Sed tiel ŝajnis eble pro tio, ke li en tiaj okazoj ofte estis kolera kaj ĉar lia foriro sen vortoj ne aŭguris ion bonan.

Preskaŭ ĉiuj renkontoj kun li ŝajnis malbonaŭguraj. Pli bone estus, se oni ne estus vokita al li nek devus vidi lin.

Sanga vojo lin kondukis al la trono, la sankta trono de Davido kaj Salomono, kaj okupinte ĝin lia unua ago estis venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj klopodis malhelpi, ke li ĝin okupu. Li ne forgesis, ke pro siaj perfortaĵoj li foje estis vokita antaŭ la Grandan Konsilantaron, antaŭ la sinedrion, kaj li ne forgesis, kiuj kaŭzis tion. Ili ne longe retenis sian vivon, malgraŭ tio, ke ili estis la plej altranga pastraro de Izrael kaj plej respektataj aĝuloj. Li malestimis la pastrojn kaj malkaŝe mokis ilin kaj la dion, kiun ili adoradis en sia malnova temploruino, kiun ili respektis pro ĝia malnoveco kaj kie oni rajtis ŝanĝi nenion en la konstruaĵo nek en la servado al la Sinjoro. Ankaŭ aliaj, kiuj lin kontraŭstaris aŭ povus kontraŭstari, viktimiĝis en la buĉado, kiun li okazigis tuj post sia veno al potenco. Kelkajn jarojn pli poste li, helpate de la romianoj, sieĝis Jerusalemon, sian propran ribeleman ĉefurbon, kaj permesis poste al la senpuraj paganoj prirabi kaj murdadi la stratojn plenaj de kadavroj kaj la sanktejon mem plena de mortigitoj kaj mortigantoj. Ne estas strange do, ke lia popolo lin malamis kaj konsideris lin monstro en homa haŭto.

Sed kiel povis okazi, ke tiu sama homo malmultajn jarojn

pli poste komencis elkovi planon konstruigi templon por tiu dio, je kiu li ne kredis. Belegan, senkomparan templon.

Kiel tio eblis? Kiel oni povas klarigi tion?

Ĉiuj, kiuj vidis la templon iom post iom konstruiĝi, opiniis — kaj ankaŭ tiuj, kiuj hodiaŭ pensas pri liaj vivo kaj sorto same opinias — ke li tion faris nur el orgojlo kaj vanteco, ĉar li volis superbrili Salomonon mem, sur kies trono, oni diris, li ne rajtus sidi, jes, eĉ superi la famajn templojn en Romo, por glori sin mem, por sia propra gloro li faris ĝin, por ke lia nomo restu post li, por ke li fariĝu senmorta.

Kaj kompreneble tiel estis. Lia gloravido estis senmezura, vere ne konis limojn. Kompreneble tio estis la kaŭzo de lia templokonstruado. Se iu demandus, li mem dirus, ke tiel estas kaj li eĉ surpriziĝus, kial oni bezonus demandi pri tio.

Lia vigla interesiĝo akompanis la konstruadon, li ĉion partoprenis, ĉion zorge prigardis, kaj ofte longe staris en medito rigardante ĝin, sian propran verkon, sin mem.

Kaj ofte, kiam li ne povis dormi, li forlasis la palacon noktomeze kaj iris tien. Je tiu horo kompreneble neniu homo estis tie, li tute sola vagadis en la konstruejo. Sola en sia templo.

Ĉirkaŭvadis tie en la mallumo per sia peza paŝado.

Kaj kiam li forlasis ĝin por reiri al la palaco, li volonte restis dum horeto rigardante la grandan astroĉielon super ĝi kaj lasis al la steloj profundigi siajn lancojn en lian solecan dezertanimon, pri kiu li nenion sciis.

Ĉar li estis agema homo, homo direktita al la ekstero, al la ekstera okazado. Li neniam pensis pri si mem. Li nur estis tia, kia li estis.

Kun profunda malfidemo la judoj rigardis tiun templokonstruadon de tre peka homo, kulpa je tiom da sangaj faroj kaj ne vere el juda gento kaj ne ĝustamaniere cirkumcidita. Ili estis agititaj pro tio, ke li konstruigas domon al la Sinjoro. Kiel la Sinjoro povas permesi tion?

Nu, certe ĝi ŝajnas fariĝi bela kaj multekosta templo kun muroj el marmoro, fremda ŝtono portita de fore, de tute alia lando, kaj ornamita per oro kaj arĝento, per kupro kaj Korinta bronzo, plej multekosta el ĉio. Sed ĉu la Sinjoro vere volas loĝi tiel? Ĉu li vere volas tion? Ĉu ne ĉio ĉi fremda kaj tro luksa propre estas por li abomenaĵo.

Ĉu li ne preferus, se oni nepre devas konstrui lian templon, ke ĉiuj ŝtonblokoj estu hakitaj el la montoj ĉirkaŭ lia propra urbo, el liaj propraj montoj. Ĉu li ne volus tion?

Lia volo ne estas facile ekkonebla. Sed se entute eblas ion scii pri la Sinjoro, oni devas kredi, ke li tiel volas ĝin.

Kaj certe li ankaŭ ne deziras, ke ĝi estu tiel luksa interne kaj ekstere, tiel riĉa kaj ornamita, sed pli simila al la malnova templo kaj al li mem.

Oni ne certe sciis tion. Oni neniam povis tute certe scii pri la deziro de la Sinjoro. Sed la ĉefpastro, kiuj el ĉiuj estis plej proksima al li, opiniis, ke kiom ajn kosta kaj bela estos ĉi tiu nova konstruaĵo, certe la Sinjoro same kiel liaj servantoj preferus, ke ĉio restu kiel antaŭe.

Tamen li ne faligis la novajn murojn, kion li povus fari, se li plene malaprobis ĉi tiun templokonstruadon de malbonulo. Kaj tio eble dependis de tio, ke la malnova templo ne per unu fojo estis malkonstruita, sed nur pecon post peco anstataŭata de la novaj muroj. Tiel ankaŭ estis en la interno, la serva-

do al la Sinjoro povis daŭri nemalhelpate, kvankam iom perturbata de la konstrulaboro, kompreneble, sed ĝi ne estis interrompita. Tion la pastroj kaj la popolo timis plej multe el ĉio, ĉar nenio estas pli necesa ol ĉiun tagon servi al la Sinjoro.

Oni devas konfesi, ke Herodo mem aranĝis la aferojn tiel, ke li mem ordonis, ke la konstruprocedo estu tia. Sufiĉe stranga faro, konfesinde, de tiu krima homo kaj profananto de ĉio sankta.

Sed oni devas menciigi, ke tio tute ne ŝanĝis ilian opinion pri li kaj ili ankaŭ ne havis kaŭzon ŝanĝi ĝin. Por ili li restis sama kiel antaŭe kaj liaj malicaj agoj en Jerusalemo kaj aliloke daŭre vekis teruron ĉie, kie liaj solduloj moviĝis. La pli multaj el ili estis fremdoriginaj kaj tute senrespektaj kontraŭ la loĝantoj de la lando, la popolo de la Sinjoro. Per helpo de ili li povis reteni sian potencon kaj resti sur sia trono. Ili alte taksis lin, ĉar li permesis al ili ĉion ajn, ili povis rabi kaj murdi kaj inter liaj malamikoj kaj inter tiuj, kiuj eventuale estus malamikoj, kaj ili povis konfiski iliajn proprajojn por si kaj sia mastro. Ili similis al li kaj tial estis tre fidelaj al li.

Ĉiuj bone konis ĉion ĉi kaj kiel sanga nebulo ĝi ĉirkaŭis lin, lian pezan staturon, kiun oni malofte vidis sed ĉiam sentis, ĉu li estis en la palaco ĉu en nekonata loko en sia regno, kie ĝuste tiam supozeble io malica estis okazonta.

Nemultaj eniris la palacon kaj oni ne bone estis informitaj pri tio, kio okazas tie. Sed oni asertis, ke la vivo tie estas obscena kun paganaj virinoj el nekonataj triboj kaj nekonataj, humiligaj malvirtoj. Kaj ke li mem estas la plej malvirta el ĉiuj.

Ne strange, oni flustris inter si — liaj spionoj povus troviĝi ĉie — ne strange, ĉar lia origino ja estas tiu lando de ĉiuj mal-

virtoj, kie iam situis Sodomo kaj Gomoro, kaj kiun poste la Sinjoro mem dezertigis.

Ili fakte ne multon sciis pri tio. La vero estas, ke kun virinoj li estis kruela kaj perforta kaj sin koncernis pri neniu krom si mem. Lia malestimo al virinoj estis malkaŝa kaj brutala kaj sian perfortemon li montris ankaŭ kun ili. Estante orienta princo li ĉiam tenis virinojn ĉe si kaj liaj adjutantoj provizis novajn al li por komplezi kaj por mem transpreni ilin, kiam li trovis ilin tedaj. Kaj ofte ili tre frue tedis lin. Post kiam li kontentigis sin per ili, li ekenuis. Kelkfoje tamen povis okazi, ke li retenis iun dum relative longa tempo. Tio vekis surprizon ĉe la ĉirkaŭantaro kaj por kelka tempo kaŭzis ian ŝanĝon en la palaco. Sed li amis neniun. Kaj neniu amis lin.

Oni ja povus diri, ke ĝi estis malvirta vivo. Sed eble ne pro tiu kaŭzo, kiun la popolo pensis. Eble ĝi estis peka plejparte pro sia ĝojomanko. La vivo ja devas esti malplena kaj senĝoja, se eĉ la amo estas malica.

Supozeble tamen ankaŭ krueleco alportas iaspecan ĝojon.

Tiel daŭris kaj la templokonstruado kaj la vivo en la palaco, la vivo, kiun oni opiniis peka kaj kiu ankaŭ estis peka, sed pro alia kaŭzo. Kaj liaj solecaj noktaj vagadoj en la templo, lia propra templo.

Kaj la stelnokto super la sankta lando, kies reĝo li estis.

Sed dum longaj periodoj li forestis de sia ĉefurbo, sovaĝe rajdante antaŭ siaj solduloj por batali, por subfrapi siajn kontraŭulojn, tiujn, kiuj eble intencus forrabi de li la potencon kaj mem potenciĝi. Tiu vivo surĉevala konvenis al li pli bone

ol io alia. Ĝi estis vivo simila al la vivo de liaj prapatroj, kiun ili vivis en siaj sudaj dezertoj rabekskursante en Judeon kaj atakante la karavanojn tien direktitajn. Ĝi estis severa kaj kruela vivo kaj li sentis ilian sovaĝan sangon en sia korpo kaj ilian sovaĝan ĝojon pri la ekzistado. Pri la vivo, kia ĝi reale estas, pri la vivo de liaj prapatroj, pri tiu, kiu donis al li lian animon.

Sed la judoj diris:

Li estas dezerthomo. Tial ni devas elteni ĉi tion.

2

Kaj li renkontis Mariamne.

Li staris sur la vojo al Damasko, nur mallongan distancon ekster la urbopordo, kaj ŝi venis preterpase. Tiel simple estis kaj tamen la momento, kiam tio okazis, estis tre malsimila al la momento tuj antaŭa, kiam tio ankoraŭ ne okazis, kaj nenio estis tiel sama kiel antaŭe, nek la sunlumo, nek la grundo, nek la malaltaj herboj sur la grundo, nek la floroj sur ĝi. Kiufloroj estas tiuj, li neniam antaŭe vidis ilin? La herboj estis morditaj de la ŝafoj, sed la florojn ili lasis, ne tuŝis. Ili ja troviĝis tie dum la tuta tempo, sed li ne rimarkus ilin, se ŝi ne estus pasinta.

Nur dum momento li ŝin vidis, sed tiu momento ne similis al alia en lia vivo, similis al nenio ĝis tiam spertita. Li tute ne komprenis, kion li travivas. Nur ke tio estas malsimila, mirinda, malebla klarigi. Kaj tuj poste ŝi estis for. Tuj poste ŝi ne estis tie.

Kaj li kovris siajn okulojn per la mano por ne forgesi, kion li vidis, por tute ne vidi ion alian.

Tiel li neniam pli frue faris. Kaŭzis strangan senton stari tie kun la mano antaŭ la okuloj, homoj ja povus surpriziĝi, sin demandi, kial li staras tiel, sed verŝajne ili kredis, ke li ŝirmas la okulojn kontraŭ la sunlumo. Sed li ne faris. Tiel ne estis.

Sed oni devas rakonti la viditan, la realaĵon malantaŭ tio, kion li travivis, kio lin tiel tuŝis.

Ŝi, kiu pasis, estis juna kaj preskaŭ delikata kaj nekutime hela estante judea virino. Kiel la nobeloj ŝi estis helene vestita kaj angulo de ŝia blanka tolmantelo estis metita sur la kapo, sur la helaj haroj. Estas sufiĉe strange, ke li ne precipe rimarkis, kiel bela ŝi estas, kiel li kutime faris, kiam li vidis virinojn. Estis, kvazaŭ ŝia beleco ne multe gravus. Kaj ĝin li povis poste rimarki, ekŝati. Ke la beleco ĉe ŝi estis memevidenta kaj kvazaŭ ne havus gravecon, ĉar ŝi mem tiom superis ĝis malpeze kiel birdo kaj ŝiaj sandaloj estis nur maldikaj planadoj kun arĝentaĵo ĉirkaŭ la maleoloj. Ŝi iris kvazaŭ sen pezo.

Tio sin prezentis por liaj okuloj. Sed iamaniere li apenaŭ vidis tion, li estis tro absorbita de la sento, kiun kreis la vido. Ni devas pensi pri tio, kia li estis kaj ke la vidaĵo venis al li kiel revelacio de io, kio estis tre malsimila al li mem, kaj ke laŭ sia kutimo li neniam estis absorbita de io alia ol si mem.

Kial tio okazis al li?

Kaj kial li troviĝis tie, ĝuste tiam, kiam ŝi pasis? Estis pura hazardo. Pura hazardo, ke li ĝuste tiam troviĝis ekster la Damaskvoja pordo. Li ne sciis, kial li iris tien, li ne havis iun gravan kaŭzon por iri tien. Kaj li neniam sen grava kaŭzo kutimis iri al iu ajn loko.

Kial tio ĉi devis okazi al li? Kaj kio vere okazis?

Li ne sukcesis atingi klarecon pri tio.

Malrapide li forprenis la manon de la okuloj kaj vidis la homojn pasi antaŭ si, el kaj en tra la Damaskvoja pordo, fremdajn homojn, tute fremdajn.

Plene absorbita li mem iris al la pordo kaj trapasis ĝin. Li provis ekscii, kiu ŝi estas. Sed tio ne estis facila. Ĉar li ne

volis malkaŝi sin mem, ne diri, kial li volas ekscii. Kaj li ne volis ŝin priskribi, ne ellasi la bildon, kiun li havis pri ŝi al tiu malnobla hordo el spionoj kaj klaĉuloj, kiu ĉirkaŭis lin, li opiniis, ke tio estus senhonta. Alie ili povus doni informojn pri preskaŭ ĉiu homo en Jerusalemo krom pri la malriĉuloj. Kaj al ili ŝi certe ne apartenas. Li opiniis, ke estus abomene utiliĝi ilin en ĉi tiu afero, miksi ilin kun ŝi. Kaj ĉu li vere povus propre rakonti pri sia vidaĵo, propre priskribi ŝin?

Daŭris tial longe antaŭ ol li eĉ sciis, kiun li renkontis.

Multfoje li iris al la damaskvoja pordo je la sama horo kiel tiam, staris tie atendente, ke ŝi venu pasante.

Sed ŝi neniam venis.

Li kredis, ke li neniam ŝin revidos.

Tiam li pro iu stranga hazardo informiĝis, kiu ŝi estas. Ke ŝi antaŭ nelonge venis al Jerusalemo, kie ŝi loĝas ĉe kelkaj proksimaj parencoj kaj ke ŝi mem ankoraŭ estas nemulte konata.

Kaj ke ŝi apartenas al la familio de la makabeoj, kies potencon li klopodis frakasi murdante iliajn plej influajn homojn. Al ilia plej alta klaso ŝi apartenas.

Celante venĝon pro la kruelaĵoj faritaj kontraŭ lia familio unu el ŝiaj parencoj, knabo nur dek du aŭ dek tri jara provis ponnardi gardiston ekster la palaco. Li estis kaptita kaj ĵetita en unu el la prizonkarceroj, provizore, ĝis oni havos tempon por li. Eble oni povos per konvenaj rimedoj elpremi el li kelkajn informojn eventuale valorajn.

Tio estis la kaŭzo, kial Herodo en la posta tago je sia granda surprizo ekvidis la junan virinon de la Damaskvoja pordo

veni al li per siaj malpezaj birdosimilaj paŝoj kaj vestita tutsame kiel tiam.

Li premis la brakapogilon de sia seĝo ĝis blankiĝo de siaj manoj, sed cetero sukcese evitis montri tion, kio moviĝas en li.

Ŝi venis por peticii gracon por la knabo, ŝia parenco, pro lia juneco, nur infano li ja estas kaj li ne povis juĝi pri sia ago.

Grandan kuraĝon ŝi ja montris alirante la timatan reĝon en tiu maniero prezentante gracpeton al tia persono kiel *li*. Eĉ pli rimarkinda ŝajnis ŝia kuraĝo, kiam ŝi delikata staris antaŭ li.

Tion li ankaŭ diris al ŝi.

Ŝi tute ne komprenis. Ja estas tute nature, ke ŝi venas, kiam temas pri tiel grava afero, kaj por tio ja ne estas necesa ia kuraĝo. Kion ŝi devus timi?

Tiuj lastaj vortoj strange impresis lin. Ion tian li neniam antaŭe aŭdis.

Iu, kiun li ne timigis...

Li ŝin rigardis. Ŝian senkaŝan vizaĝon kun la pala delikata haŭto multe pli hela ol tiu de aliaj. Sed ŝiaj okuloj kaj okulharoj estis malhelaj kaj ŝia rigardo malhela sed mirinde milda.

Nun li vidis, kiel bela ŝi estas, nur nun li tion rimarkis.

Ŝiaj lipoj estis pale ruĝaj kaj iom elstaraj kaj tute ne ŝminikitaj kiel ĉe liaj virinoj en la palaco kaj ofte ankaŭ ĉe la nobelinoj en la urbo.

Li do el tiu ĉi buŝo, el ŝia propra buŝo, aŭdis, kiu ŝi estas kaj ceterajn aferojn pri ŝi. Tute sen hezito ŝi informis lin, ke ŝi samkiel la knabo apartenas al la familio de la makabeoj kaj ŝajnis kvazaŭ ŝi fierus pri tio. Certe ŝi sciis, ke ankaŭ ili iam estis reĝoj.

Denove li pensis, de kie ŝi prenas sian kuraĝon. Ĉu povus esti, ke ĝuste ŝia delikateco ŝin faras forta kaj kuraĝa?

Li renkontis ŝian rigardon, hezite, ĉar li sciis, kia estas lia propra rigardo, ke oni kutimas sin forturni de ĝi.

Sed ŝi ne forturnis la sian. Ŝi renkontis lian rigardon tute trankvile kaj nature kaj ne lasis maltrankviligi sin.

—Ni venigos la knabon, li diris.

Gardisto venis kun li. Li estis malgrasa kaj maldika kompare al sia aĝo, havis karbonigrajn harojn kaj nigrajn okulojn, kiuj estis tute sovaĝaj pro malamo. Kiam li ekvidis Herodon, ŝajnis kvazaŭ li volus sin ĵeti sur lin. Ŝin li vidis nur per rapida surpriza rigardo kaj poste ne plu sin turnis al ŝi.

Herodo iom amuzite rigardis la knabon kun rideto, kiu eble tamen ne estis tute sendanĝera.

—Kiel vi povis veni al la ideo fari tiajn stultaĵojn, li diris kaj taŭzis liajn nigrajn harojn.

Poste li palpis liajn brakmuskolojn.

—Kiel forta vi estas? li diris ridetante.

—Lasu lin kuri, li poste diris al la gardisto. Li neniam ripetos tion.

La knabo denove rigardis lin malame kaj poste senemocie kaj senurĝe forlasis la halon. Nur koksvesteton li portis, nenion pli. La dorso estis magra kaj osteca, la malgrandaj skapoloj elstaris.

Herodo sin turnis al ŝi.

—Mi vin vidis jam unu fojon, li diris.

—Ĉu tio vere estas ebla, ŝi respondis.

—Jes. Ekster la Damaskvoja pordo. Tie kreskas floroj, kiuj

estas tre belaj, sed mi ne scias, kiel ili nomiĝas. Kaj mi ne vidis, ke ili estas belaj, antaŭ ol vi pasis.

Ŝi nenion respondis, sed metis sian mallarĝan manon antaŭ la sino kvazaŭ por sin ŝirmi. Oni diras, ke tiel virinoj senkonscie faris en ĉiuj epokoj. Ankaŭ ŝi ne estis konscia pri tio, ŝi ne sciis, ke ŝi tiel faris.

—Poste mi plurajn fojojn iris tien kaj esperis, ke vi denove pasos. Sed vi neniam faris.

Nun vi venis. *Vi* venis al *mi*. Mi ĝojas pro tio kaj pro tio, ke mi vidas vin denove. Kaj se mi povis iom fari por vi, kio donis al vi iom da kontento, tio ĝojigas ankaŭ min. Se ion alian vi ekdeziros, turnu vin al mi kaj mi faros, kiom mi povos. Mi kredas, ke mi povas ĉion fari por vi.

Ĉu mi do povas esperi vin revidi?

—Jes, ŝi maldecideme respondis kaj unuafoje ŝajnis, kvazaŭ ŝi perdis sian certecon.

Li tion rimarkis.

Ili disiris kaj ŝi tre kviete elpaŝis el la granda halo kaj same kviete la tutan vojon hejmen.

Kiel fatale por ŝi, ke ŝi lin renkontis.

3

La famo diskuris pri tiu nekredebla mildeco ĉe la tirano kaj pri tio, kiu akiris la liberiĝon de la knabo. Estis nekompreneble, sed ĉe la subprematoj vekiĝis malforta espero. Tre multaj havis edzon aŭ filojn aŭ aliajn parencojn suferantajn en liaj prizonkarceroj, se ili ne jam estis mortigitaj aŭ forpasis pro perfortaĵoj, manksuferoj kaj malsato. Pri tio oni sciis nenion. Ili venis al ŝi kaj petegis ŝin pri helpo, ke ŝi provu akiri gracon ankaŭ por ili.

Ŝi ektimis pro tio, kion ili postulis de ŝi. Kaj pro iliaj vizaĝoj tiel agigitaj kaj senesperaj, kiel ŝi neniam vidis ĉe homoj.

Ŝi certe volus ilin helpi, se ŝi povus. Ilin ĉiujn helpi. Sed kiel ŝi povus? Ili ŝutis siajn petojn sur ŝin, sed ili ne sciis, kion tio signifas por ŝi mem. Kiel ŝi povus diri tion al ili, tion ŝi ja ne povas.

Ŝi ja ankaŭ ne povas iri al li petante gracon por ĉiuj tiuj, tiukaze li certe tre kolerus kaj tute neniun amnestius. Ŝi povus peti por nur unu sola. Tion ŝi ankaŭ diris al ili, klarigis al ili. Tiam ĉiu volis, ke ŝia filo, ŝia edzo estu elektita. Ĉar tia estas la homo. Estis malfacile por ŝi vidi ĉiujn tiujn suferantajn, plorkonsumitajn vizaĝojn kaj elekti unu el ili.

Farinte sian elekton ŝi nenion diris pri ĝia rezulto kaj tial ĉiu el ili kredis, ke ŝi elektis laŭ ties peto, elektis lin, kiun ŝi aŭ li tiom sopiris revidi.

Kaj kun maltrankvila koro ŝi denove iris la pezan vojon tien, denove al la palaco.

Kiam li ŝin ekvidis, li ekstaris kaj iris al ŝi renkonte kun rideto, kiu klare montris lian ĝojon, ke ŝi revenis. Li silente ŝin rigardis kaj lia rigardo estis serĉa, sed ne malfacile eltenebla. Ĝi ne estis avida, kiel oni povus kredi aŭdinte ĉion, kion oni diris pri li. Ŝajnis, ke ĝi nur volas ŝin vere vidi, ne nur postuli ŝin, sed kun speco de granda seriozeco kaj preskaŭ kun tenoro. Timon aŭ maltrankvilon ĝi ne kaŭzis.

Estis do ne tiel malfacile, kiel ŝi pensis, kaj sen timo ŝi eldiris sian postulon.

—Ĉu ankaŭ li estas via parenco? li demandis.

—Ne, li ne estas.

Li ŝin serĉe rigardis. Poste li alvokis la komandanton de la prizona gardistaro kaj montriĝis, ke la prizonulo estas juna homo kondamnata al morto.

Kiam la komandanto post mansigno de li denove foriris, li turnis sin al ŝi.

—Kiu junulo li estas? Ĉu vi lin konas?

—Ne.

—Kial vi do tiom klopodas, ke li havu amnestion?

—Ĉar lia patrino min petis pri tio.

—Ĉu. Lia patrino.

Dube li ŝin rigardis.

—Ĉu vi vere ne konas lin?

—Kiel mi povus koni lin. Mi ja ĵus venis al Jerusalemo.

—Jes, li diris trankviligite. Ja veras tio.

Tio estis la unua fojo, ke ŝi rimarkis lian suspektemon, kiu estis malsano, kiun li suferis.

Poste li tute ŝanĝiĝis, li promesis liberigi la prizonulon kaj

ili ne plu parolis pri tiu afero. Anstataŭe li montris al ŝi la palacon, unu ĉambron post la alia, relative dezertajn ĉambrojn, ŝi surpriziĝis, ke li tiel loĝas. Kaj pri tio, kiel malmulte da homoj estas tie, nur iuj servistoj. Neniuj virinoj — ŝi aŭdis, ke estas multaj. Estis kvazaŭ li loĝus tute sola en la granda palaco. Krom la prizonuloj malsupre en la prizonkavernoj, kompreneble, kaj tiuj, kiuj gardis ilin.

Kiam ili revenis al la halo, kie li ŝin akceptis, li diris:

—Certe vi komprenas, ke mi amnestias tiujn krimulojn nur, ĉar mi volas revidi vin. El neniuj aliaj motivoj. Mi ne devus fari tion. Mi scias.

Kaj ili disiris.

Fakte estis tiel, ke li forsendis ĉiujn virinojn el la palaco, ĉiujn ŝminkitajn putinojn kaj ankaŭ ĉiujn obskurajn personojn, virojn kaj virinojn, kiuj ĉirkaŭis lin. Ke li purigis la tutan domon.

Li neniun virinon havis, post kiam li ŝin renkontis.

En tiu maniero ŝi daŭrigis viziti lin, ĉar ĉiuj tiuj mizeraj parencoj de prizonuloj tion petadis kaj ĉar ŝi mem estis plena de kompatado por tiuj, kiuj suferas en lia malliberejo. Kelkfoje li decideme neis, estis senceda, kaj iufoje ŝi povis kompreni, ke tiu, por kiu ŝi petas, ne plu vivas. Sed ofte ŝi povis akiri gracon ĉe li, ĉe tiu por ĉiuj aliaj timiga homo, kaj tiam opinii, ke ŝi faris ion bonan oferante sin. Ĉar ofero ĝi estis por ŝi, tion ŝi devis konfesi.

Ŝiaj propraj parencoj malaprobis tiujn vizitojn ĉe la malamata idumido, kiu kulpis la morton de tiom da iliaj proksimuloj. Ŝi ja loĝis ĉe ili kaj dependis de ili kaj estis por ŝi tre mal-

facile elteni ĉion, kion ili diris al ŝi, aŭdigis al ŝi. Ĉu ŝi eble ne scias, ke du el la fratoj de ŝia patro viktimiĝis pro la abomena tirano, kiu kun helpo de la romianoj uzurpis la tronon, malgraŭ tio, ke li ne devenas de la juda gento. Kaj certe ŝia propra patro renkontus saman faton, se li ne mallonge antaŭ la murdo de ili mortus nature.

Plej kruela kontraŭ ŝi estis la knabeto, kiu antaŭe estis tiel kortuŝe sindona al ŝi, ĉiam serĉis ŝian societon. Lia vizaĝeto estis tute tordita, dum li superŝutis ŝin per mokaj insultoj kaj montris al ŝi sian malestimon. Sed ŝi tre milde lin rigardis kaj kelkfoje metis sian manon sur lian kapon por kvietigi lin. Ne estis strange, ke li tiel kondutis, ĉar lian patron Herodo kredible mem mortigis, hakis per sia glavo, eble tiu sama, kiun li ĉiam portadis en la palaco.

Sed aliaj homoj, tiuj, kiujn ŝi helpis, kaj tiuj, kiuj esperis helpon, estis plenaj de dankemo kaj montris al ŝi tion en ĉiu maniero. Iliaj vizaĝoj lumis, kiam ili ŝin renkontis kaj virinoj genufleksis kaj kisis ŝian mantelborderon. Tiuj homoj donis al ŝi grandan ĝojon kaj kaŭzis, ke ŝi ne povis ĉesigi siajn klopodojn kompatigi la koron de la kruela reganto. Sed kompatigeblan koron li verŝajne ne havis, kaj li ja diris, ke li ilin amnestias nur, ĉar ŝi petas lin pri tio, ĉar li volas ŝin revidi.

Estis malfacile por ŝi pensi pri tio, ke li tiel diris. Kio okazos al ŝi sur tiu vojo, kiun ŝi ekiris, sur tiu eble danĝera vojo?

Kaj inter siaj propraj parencoj ŝi fariĝis pli kaj pli sola kaj forlasita. Plej forlasita de la malgranda dura knabo, li, kiu sin ĵetis en ŝian ĉirkaŭbrakon, kiam ŝi unuafoje venis al ili, kiam li unuafoje ŝin vidis.

Kiam ŝi proksimiĝis al la palaco, ŝi tion ĉiam faris kun peza koro. Apud ĉiu enirejo estis duobla gardo kaj ĉe la ĉefenirejo eĉ pli kaj ĉirkaŭ la kastelo bivakis soldatoj armitaj per glavoj kaj aliaj armiloj. Kaj tiu, kiun ili gardis, estis sola viro, kiu ĉirkaŭiras tie en la dezertaj haloj, ankaŭ li kun glavo, ĉar li ĉiam timas pri sia vivo, oni diris.

Ĉu ŝi ĉi tiun fojon povos ion akiri de li, de tiu viro, kiu ŝajnas mem kaptito en sia malica kastelo.

Lun tagon li ŝin demandis, ĉu ŝi volas edziniĝi al li. Li ne diris, ke li ŝin amas, ĉar tion ŝi ja nepre komprenis jam longe, kaj li ne povis eligi tiun rimarkindan vorton trans siaj lipoj. Li ĝin neniam uzis kaj estis hontema pri ĝi. Tio kredeble ne estas vorto por li, tion li sentis.

Ŝi nenion respondis. Kaj li ankaŭ ne postulis tion. Ŝi bonvolu pensi pri tio dum kelka tempo, li diris preskaŭ submetiĝeme.

Kiel ventetis ŝia spirado inter la duonapertaj, palaj lipoj, kiam ŝi ĉifoje lin forlasis. Kiel ŝi rapidis antaŭen tra la stratoj per siaj birdofacilaj paŝoj, kun sia malkvieta koro! Rapidis? Kien ŝi rapidu? Ŝi havis tute nenion, tute nenian lokon al kiu rapidi.

Ŝi komencis iri malpli rapide. Komencis iri tre malrapide, sen celo. Kaj ŝi klopodis regi sin. Pensi. Pensi pri tio, kiel ŝi agu. Ekzistis neniuj, kiu povus helpi ŝin. Ŝi devis decidi tute sola. Pri si mem. Ŝi kutimis tion. Tion ŝi devis diri al si. Sed nun estis multe pli malfacile ol iam antaŭe.

Ĉu ŝi oferu sin eĉ ĝis tio, ke ŝi partoprenos lian vivon? Lian timigan vivon. Ŝi ne povos fari tion el propraj motivoj, devos esti pro alies. Ĉu ŝi povos atingi ian bonon per tio. Transdon-

ante sin al li. Ian bonon por ĉiuj tiuj mizeraj suferantaj homoj, kiuj ŝin petegas, kiuj ŝin fidas. Por ĉiuj tiuj, kiujn li suferigas.

Ĉu si povus ian bonon fari donante sin al li? Tiel ŝi sin demandis foje kaj refoje. Ĉu ŝi povus fari lian animon pli milda kaj liajn agojn ne tiom malicaj? Ĉi ŝi povus? Ĉu ŝi povus lin ŝanĝi?

Li efikis forpuŝe al ŝi. Sed ŝi tamen ne konsideris lin tiel, kiel ĉiuj aliaj. Ŝi ne povis nei, ke ŝi pro ĉiuj tiuj vizitoj ekhavis iaspecan senton por li, por la de ĉiuj malamata, juste malamata. Ŝi lin kompatis. Kion tiu sento signifas, ne estis facile diri. Ŝi ne povis klarigi ĝin al si mem kaj ankaŭ ne volis tion. Ŝi facile sentis kompaton kaj eble ankaŭ por li ŝi sentis tion. Sed nur kompatato ĝi eble ne estis.

Lin ami ŝi neniam povos, tion ŝi sciis. Por tio li estis al ŝi tro forpuŝa. Sed kompaton ŝi povis senti. Kaj kiam ŝi sentis tion, ŝi ankaŭ sentis bezonon sin oferi, ŝi rimarkis. Ĉu ŝi sin oferu ankaŭ por li?

Pri amo ŝi sciis nenion. Ŝi kredis, ke ŝi nur oferas sin.

Kie ŝi vere troviĝas? En kiu strato? Ŝi opiniis, ke ŝi ĝin rekonas. Ĉu ĝi ne kondukas al la Damaskopordo? Jes, tie ŝi ja vidas la pordon.

Ĉu tien ŝi iru?

Ŝi faris tion kaj poste mallongan distancon sur la vojo, restis tie kelkan tempon. Sur la kampo apud la vojo troviĝis neniam floroj. Ne plu. Oni povis vidi, ke ili troviĝis, sed ili jam velkis.

Tiam ŝi reiris hejmen.

Post kelka tempo ŝi iris al la palaco kaj diris al li, ke se li tion deziras, ŝi konsentas edziniĝi al li. Li fariĝis tre feliĉa pro tio.

Malgraŭ tio, ke li kredeble ne kutimis senti feliĉon kaj tial kredeble ankaŭ ne kutimis ĝin esprimi, ĝin montri.

Ŝi donis al li sian manon, ĝi estis tiel mallarĝa kaj malgranda en lia, ke ambaŭ ridetis iomete, kvankam ili estis tiel seriozaj. Ili staris tie unu antaŭ la alia, tiel malsimilaj kiel eblas pensi, ŝi gracila kaj fragila, kun tiu delikata vizaĝo, kiun ŝi heredis de multaj generacioj, kiu estis bela kvazaŭ de antikva belo, kaj li kun sia granda, peza korpo, kun vizaĝo ankaŭ peza kaj malbela, kun krudaj trajtoj.

Li ne ŝin ĉirkaŭbrakis, nenio tia, neniam alproksimiĝoj ajn specaj, kaj ŝi estis pro tio dankema al li. Sed poste, kiam ŝi sin trovis survoje for de tie, ŝi pensis, ke eble estas maljuste de ŝi, ke ŝi estas dankema pro tio.

Ŝi apartenis al tiuj homoj, kiuj ĉiam demandas sin, ĉu ili faris maljuston.

4

Dum la geedziĝa nokto ŝin timigis la perfortema pasio, kun kiu li ŝin ekkonis. Ŝi ne havis sperton pri amo kaj neniam imagis, ke ĝi povus esti tia. Ŝi klopodis lin sekvi en lia pasiforto, sed neniam antaŭe viro ekkonis ŝin kaj ŝi ne havis sperton kiel samtempe sin submeti kaj lin regi. Nur la mallumo evitigis al li ion rimarki, vidi ŝiajn turmentatajn vizaĝtrajtojn.

Estis tro perforte kaj dolorige, por ke ŝi povu senti ĝuon tiun fojon.

Sed pli poste ŝi povis, almenaŭ kelkfoje. Ŝi pli kutimiĝis al li kaj ankaŭ sukcesis fari lin konsiderema al ŝi, pli prizorgema. Ŝiaj propraj instinktoj ja ankaŭ vekigis kaj malgraŭ la granda malsimileco inter ili, aŭ eble ĝuste pro tio, ŝi kelkfoje spertis profundan kontentiĝon. Ŝi devis tion konfesi, kiel ajn antipatia ŝi opiniis lin.

Tiel ilia kunvivo fariĝis pli bona ol ŝi kuraĝis esperi. Sed tute kutimiĝi al li ŝi ne povis. Ŝi timis, ke li rimarkos, faris ĉion por ne montri. Sed ne ĉiam tio eblis kaj ŝi ja sciis, kiel suspektema li estas. Ŝi klopodis tute ne pensi pri tio, ne atenti pri tio ĉe li, kio vekis ŝian antipation. Kaj en tio ŝi vere pli kaj pli sukcesis.

Sed ami lin, tion ŝi ne faris, almenaŭ ne laŭ sia kompreno.

Ŝi aranĝis tiel, ke la palaco, almenaŭ parteto de ĝi, fariĝis pli kiel hejmo. La dezertecon ŝi forpelis kaj la ĉambroj, kiujn ŝi elektis por ili, fariĝis loĝeblaj kaj preskaŭ plaĉaj, oni povis vidi, ke ili estas destinitaj por homoj. Vere senti komforton tie ŝi ne povis, sed la ĉambroj tamen havis alian karakteron ol antaŭe. Kelkaj el la grandaj dezertecaj haloj devis resti tiaj kiel antaŭe, sed tio ne estis grava, ŝi ja tamen neniam vizitis ilin.

Kion ŝi ne povis elteni, tio estis la malliberuloj en la kelo sub la palaco. Ne pro tio, ke io estus aŭdebla de tie, aŭ ĉar oni povus iel ajn rimarki ilin, sed pro tio, ke ili estis tie. Ŝi tion diris al li, ke ŝi ne povas elteni scion pri tio, kaj petegis lin forlevi de ŝi tiun ŝarĝon liberigante ilin. Ŝi ja sciis, ke li neniam faros tion pro ili mem. Tial ŝi petis, ke li faru tion pro ŝi. Pro la kaŭzo, ke ŝi fariĝis lia edzino kaj vivos sian vivon en lia palaco. En prizono ŝi ne volas vivi.

Post kiam ŝi detale klarigis tion, li konsentis. Ĉiuj prizonuloj estis liberigitaj escepte de iuj tre severaj krimuloj, kiuj estis kondamnitaj al morto, kiuj atendis nur tion.

—Tiel ankaŭ ili liberiĝos, li diris sen ia ajn moko, tute serioze.

Tio ja estis rimarkinda okazaĵo kaj kiel fajro la famo pri ĝi kuris tra la urbo. Oni ne kredis, ke ĝi estas vera, sed montrigis, ke ĝi estas. Kaj tiuj multaj, kiuj rericervis siajn karulojn, benis la nomon de Mariamne, la nomon de la bona reĝino Mariamne, ŝi, kiu tuŝis la koron de la malica reĝo kaj decidigis lin por tiu ĉi nekomprenebla mildeco.

Benata ŝi estu. Benata ŝi estu.

Sed ŝiaj parencoj sentis naŭzon kaj malamon kontraŭ ŝi sen mezuro kaj limo pro tio, kion ŝi faris, post tio ke ŝi fariĝis edzino de la abomenata kaj vomiga uzurpanto. Kia humiliĝo por ilia familio, kiu estis de vere reĝa sango. Kia honto. Neniam eblos tion pardoni kaj ĉiuj rilatoj inter ili ĉesis. Jes, ili eĉ povus deziri ŝian morton, nur por ke ŝia kaj ilia honto forviŝiĝu.

Sed pri tio ŝi nenion sciis kaj ne kredus tion, se oni rakontus al ŝi.

La popolo, kontraŭe, almenaŭ la plimulto, plene adoris ŝin post la liberiĝo de la prizonuloj kaj pro esperoj, kiujn ili havis pri ŝia bona influo al la tirano. Se iu ŝanĝo povus okazi, tio estus merito por ŝi, nur por ŝi. Kaj ili fidis ŝin pri ĉio.

Sed ili ŝin adoris ankaŭ pro ŝi mem, ne nur pro ŝiaj bonfaroj. Pro ŝia karaktero, ĉar ŝi ŝajnis tiel diferenca de ĉiuj aliaj. En tiu kruela kaj severa tempo ŝi estis milda kaj kvieta al ĉiuj renkontatoj, kiujn ĉiujn ŝi rigardis per sia malhela rigardo. Tuj, kiam ŝi sin montris sur la stratoj, ŝi estis amata, amo ŝin alfluis. Kaj ŝi estis konata de ĉiuj, tuj rekonita. Tio ankaŭ dependis de tio, ke ŝi preskaŭ ĉiam estis same vestita. Kvankam nun reĝino, ŝi estis vestita tute kiel antaŭe, relative simple, ŝajnis, sed kredeble ne estis. Ŝiaj vestoj ofte estis broditaj per arĝentfadenoj, ŝia mantelo havis arĝentan borderon, ankaŭ la zono ofte estis el arĝento. Kaj ŝiaj sandaloj ĉiam havis arĝentaĵon ĉirkaŭ la maleoloj.

La pala arĝento konvenis al ŝi, konvenis al ŝia speco de beleco, kvazaŭ apartenis al ĝi. Se ŝi portis ornamaĵojn, ili ĉiam estis el arĝento, neniam el oro. La reĝo havis fortan deziron, precipe dum la unua tempo, ŝin superŝuti per multekostaj

juveloj, per ĉiaj gemaj ŝtonoj de la oriento, arte facetitaj kaj poluritaj por ornami virinojn. Sed ŝi ĉiujn malakceptis. Ŝi ne volis ŝanĝiĝi, ĉar ŝi fariĝis reĝino, ŝi volis resti, kia ŝi estis kaj vestiĝi kiel ŝi, ne multe pensante pri tio, jam elektis.

La popolo amis vidi ŝin ĝuste tia. Tiuj, kiuj ŝin renkontis sur la stratoj, ekhavis ion brilan en siaj okuloj, kiam ili rekonis ŝian belan staturon. Kaj tiuj virinoj, kiuj genuis antaŭ ŝi kaj kisis ŝian mantelborderon, ne povis imagi ŝin alia. Ĉiuj ŝin amis ĝuste tia.

Ili nomis ŝin Mariamne la arĝentvestita.

Iun vesperon, kiam maljuna servistino de ŝiaj parencoj sekrete ŝin vizitis en la palaco, ŝi eksciis, ke la malgranda durkora knabo rifuĝis al la montoj al makabea bando, kiu sin tenadis tie.

Ŝi sin demandis, ĉu lia fuĝo povus havi koneksojn kun tio, ke ŝi edziniĝis al la malamato. Ŝi esperis, ke ne. Sed ĉiuvespere ŝi kuŝis pensante pri li estanta en la montaro kaj vidis lian malgrandan turmentatan vizaĝon antaŭ si.

Certe estis vero, ke ŝi bone influis la reĝon. Li vere boniĝis kaj lia regado fariĝis pli milda, lia krueleco malkreskis aŭ almenaŭ fariĝis malpli evidenta. Oni ne povis nei, ne povis ne rimarki tion. Kaj ke Mariamne kaŭzis tion, neniu povis dubi. Ankaŭ tiuj, kiuj ŝin malestimis pro ŝia interligo kun la abomena idumido, rekonis tion.

Ĉiuj, escepte de ŝia propra parenco, kiu restis neŝanĝita en sia mortiga malamo.

Foje li ŝin akompanigis al la templo. Li volis montri ĝin al ŝi,

sian propran templon. Ili longe promenis tie kaj li ĉion klarigis al ŝi, kia ĝi estos kaj ke ĝi estos eĉ pli bela ol tiu de Salomono.

Ŝi aŭskultis, sed ŝajnis, kvazaŭ ŝi ne multe atentis pri tio, kion ŝi vidas. Ŝajnis, kvazaŭ tio nenion signifas por ŝi. Eble ŝi ne bezonis templon.

Ŝi ja estis tre malmulte memblovita homo. Tiel oni ne povis diri pri li, kiu konstruigis tiun sanktejon por si. Ŝi estis turnita en sin mem, vivis en si mem. Sed en tute alia maniero ol li. Eble ŝi fakte ne estis religiema. Aŭ ŝi estis, ne sciante. Samkiel ŝi estis bona sen konscio pri tio, ne pensante pri tio. Ĉu eble estis tiel?

Ĉu eble ŝi ne bezonis templon?

Dum siaj noktaj templovagadoj li ne akompanigis ŝin. Li iris tien sola kelkfoje, ĉirkaŭvadis tie en la mallumo.

Kial li faris? Li mem ne sciis. Tio ja ne havis sencon. Tamen li iris tien. Sufiĉe longe li ĉirkaŭvadis en la mallumo. Poste li staris dum horeto sub la flama noktoĉielo, suprenrigardis al ĝi.

Konekso inter li kaj tio, kio estas dia, ne ekzistis. Lia interno estis kiel dezerto kaj la steloj profundigis siajn fridajn lancojn en lian animon.

Parton de sia vivo li ĉiam tenis por si, ne permesis al ŝi informiĝi pri ĝi. Ne nur pri noktaj templovagadoj, sed pri tute aliaj aferoj. Li ne havis la kutimon sin konfidi. Kaj li neniam sin konfidis al ŝi. Ili neniam sin konfidis reciproke, tio ne konvenus al ili, al neniuj el ili.

Ankaŭ ŝi havis la kutimon decidi pri si mem kaj li lasis al ŝi fari tion. Ĉiu el ili sin koncernis pri siaj aferoj kaj la alia ne sin miksis en tio.

Sed li ĉiam multe pli bone sciis, kion ŝi faras, ol ŝi pri li. Li havis tre grandan observemon, interalie pro sia suspektemo. Kaj krom tio li ja havis sian bone organizitan spionaron.

Ekzemple, li tre bone sciis, ke la maljuna servistino de ŝiaj makabeaj parencoj ŝin vizitas.

Ŝi maltrankviliĝus, se ŝi sciis, ke li scias.

Li estis sufiĉe amara pro tio, ke la knabo, kiun li liberigis, fuĝis inter la montojn al iu loko de la makabeoj. Estis vere stulta ago de li liberigi lin, tion li neniam devus esti farinta.

Longe li estis amara pro tio, kvankam tio neniom gravis.

Sed al Mariamne li nenion diris.

Lia perfortema deziro je ŝi ne malkreskis. Ŝi malfacile povis elteni tion, ĉar li tiom postulis. Lia forto ŝajnis senfina, dum ŝia bezono de tenero estis tiel granda, ke li ne kontentigis ĝin. Ŝi ja klopodis kaj ankaŭ sukcesis igi lin pli komplezema al ŝi, sed li ne ĉiam estis. Li ankoraŭ plu atentis pli multe pri si mem kaj estis tro perfortema en la amo kiel en ĉio alia. Foje ŝi preskaŭ kredis, ke lia korpo ŝin sufokos.

Li ja neniam havis tian virinon kiel ŝi, lia pasio verŝajne dependis ankaŭ de tio. De tio, ke ŝi estis tute nova sperto por li, io tute mala. Kaj lia kapablo ŝin kompreni, intimiĝi kun ŝiaj tute alikvalitaj kaj malpasiaj sentoj dependis ankaŭ de tio.

Amon li neniam antaŭe travivis, li ĝin ne konis. Ĝi ankaŭ estis tute fremda al lia vera naturo. Li ŝin amas, tion li sciis,

sed li ne sciis, kiel tio devus konkretiĝi. Kaj lia amo lin ne ŝanĝis.

Sed la deziron pri ŝi li komprenis kaj li kredis, ke ĝi sufiĉas kaj ke ĝi estas la amo.

Ŝi ofte estis tro ellacigita por kapabli ion senti, sed spite al tio ŝi faris ĉion eblan por lin renkonti, por lin kontentigi. Parte pro tio, ke ŝi timis nei al li ion ajn kaj parte ĉar ŝi volis, ke li ĉe ŝi trovu liberiĝon de ĉio, de sia sovaĝa instinkto, de siaj senmoderaj deziroj, de ĉio.

Kiam ŝi poste karesis lian frunton, li kvietiĝis, kaj okazis kvazaŭ ŝi donus al granda peza besto ripozon. Ŝi ŝatis scii, ke ŝi tion faras por li. Ĉar iasence ŝi ja ŝatis lin, certe ŝi faris. Kompatis lin kaj iom ŝatis lin.

Kiom malica li propre estas? Ja ne tiom, kiom antaŭe, ĉu? Kaj al ŝi li ja neniam estis malica.

Sed ŝi volis fari lin bona al ĉiuj.

En tia disvolviĝo de ilia kunvivo ja tamen ne eblis ne rimarki la streĉitecon en ŝia amo al li kaj ke ŝi ne sentas la samon kiel li. Kun aliaj virinoj li sin ne koncernis pri tiaj aferoj, se nur li mem kontentiĝis, povis fari laŭ sia volo. Sed rilate al ŝi la afero estis tute alia. Li suferis pro tio, sed nenion volis montri, tenis tion ĉe si mem. Nenion li volis montri, nenion li volis konfidi el tio, kion li sentis. Ne estis facila afero por viro kia li travivi tian humiliĝon, sed antaŭ ĉio li volis nenion forkonfidi.

Ke li vere suferas, oni ne povis dubi. Li fariĝis ĉiam pli fermita en si kaj kovanta kaj lia rigardo ŝin timigis, ŝi ne kuraĝis ĝin renkonti. Kaj ankaŭ li evitis rigardi ŝin. Ŝi ja sciis, de kio tio dependas, sed ne kuraĝis paroli kun li pri tio. Kaj kion

ŝi povus diri? Ne estas facile por du kunvivantoj paroli pri tia afero. Kaj ilia plena manko de konfidemo inter si faris tion malebla. Ŝi penis eĉ pli kontentigi lin kaj montri al li, ke ankaŭ ŝi vere bezonas lin, ke ne nur li bezonas ŝin. Sed tio nur kreskigis lian suspektemon kaj lian ĉiam atentan observadon pri ŝi kaj nur eĉ pli faris ĉion evidenta al li kaj ankoraŭ pli fatala por ili ambaŭ.

Ĉiam pli silentiĝis inter ili kaj li kiom eble plej evitis montri, ke li ŝin bezonas, kvankam estis malfacile devigi sin al tio. Fine li ne plu proksimigis sin al ŝi, ne plu ŝin postulis.

Sian amon al ŝi li montris en tiu maniero.

La bataloj en la montaro ekflagris denove. En Jerusalemo ne multaj sciis, sed tiuj, kiuj havis konektojn kun la bando de makabeoj en la nordo ja konis la aferon. Kaj Herodo, kiu akceptis kurierojn de la tuta lando, kompreneble sciis ĉion kaj kie tiuj bataloj komenciĝis. Ĉifoje ne liaj soldatoj iniciatis la lukton, sed ili estis atakitaj de la makabeoj. Liaj trupoj estis laŭdire malfortaj en tiu regiono ĝuste nun kaj tial la makabeoj ekatakis.

Oni rimarkis en la palaco pro ĉiuj tiuj kurieroj, ke io grava okazis, ankaŭ Mariamne ne povis ne rimarki tion. Tial ŝi ne surpriziĝis, kiam li klarigis, ke li devas forlasi Jerusalemon por kelka tempo, ke lia ĉeesto necesas aliloke, li ne diris kie. Ili adiaŭis unu la alian kaj ŝi longe tenis lian manon en sia. En siaj ambaŭ manoj ŝi ĝin tenis, en siaj malvarmetaj manoj.

Kiel ĉiam li sentis faciliĝon forirante de la palaco kaj Jerusalemo. Ne malpli ol iam li sentis tiel, sentis kvazaŭ liberiĝon.

Kiam li kun sia sekvantaro kaj aldonaj trupoj, kiujn li ve-

nigis kun si, alproksimiĝis al la montoj kaj sentis la freŝan venton de tie, tiam li kvazaŭ denove trovis sin mem, sian malnovan personon, la personon de siaj gepatroj, malgraŭ ĉio, kio koviĝis en li kaj maltrankviligis lin.

Nur li sidis surĉevale, kaj li rajdis antaŭ la aliaj, antaŭ la gvardio kaj la trupoj kaj tiamaniere sola. Sed ili kutimis al tio, li neniam multe rilatis kun ili, nek kun la trupoj nek kun la oficiroj. Malgraŭ tio li estis, kiel dirite, tre ŝatata de siaj soldatoj. Kompreneble tio dependis de tio, ke li permesis al ili agi kiom ajn senbride, rabi kiom ajn ili volis. Sed verŝajne ili ankaŭ aprecis, ke li sin tenis flanke kaj sola en tiu maniero, sen ligo kun ili, kredeble tia ili preferis gvidanton, komandanton. Li ne estis unu el ili, ne devus esti.

Jam longa tempo pasis, dum li ne militis kun ili, kaj ili ŝatis revidi lin ĉe si. Sed lia humoro estis tre morna kaj premata, tion ili rimarkis.

Kiam ili atingis la montojn, ili unuafoje kontaktiĝis kun siaj kunbatalantoj renkontante gardiston en ravino, kiun ili laŭmarŝis. Ili informiĝis, kie estas la trupoj. En valo pli alte ili estis trovitaj, kelkaj fajroj brulis en la valo, ĉar tiel alte estis malvarme en tiu sezono. La oficiro surpriziĝis de la neatendita vizito, certe li ja petis aldonajn trupojn, sed ne atendis, ke Herodo mem venos kun ili. Li devis informi pri ĉio, kio okazis ekde la komenciĝo de la bataloj kaj Herodo silente aŭskultis. Poste li faris riproĉojn pri multo farita, kaj kiam la komandanto defendis sin dirante, ke liaj taĉmentoj estis nesufiĉaj, li respondis, ke la trupoj certe sufiĉus, se li nur uzus ilin en ĝusta maniero. Li estis malbonhumora kaj montris tion senkaŝe. La komandanto, kiu estis iom aĝa viro kutimiĝinta al li kaj lia foje ĝene varia temperamento, komprenis, ke li

malĝuste prijuĝis pro malbonhumoro. Herodo tiel bone konis la batalojn en la montaro kaj la eblajn malfacilaĵojn en ĝi, ke li ne juĝus tiel, se nenio alia efikus sur lin.

Dum ili interparolis venis gvatisto kurante de altaĵo, kie li gardis, kaj kriis jam el longa distanco, ke la malamikoj jam trapasas la orientan intermontan pasejon. Tiu pasejo estis unu el la enirejoj al la valo.

Herodo tuj mem prenis komandon kaj rapide eldiris siajn ordonojn. Li preferus renkonti la malamikojn en la pasejo, se tio estus ebla, sed povus okazi, ke ne estus. Antaŭ ol la trupoj ordiĝis kaj la helpaj taĉmentoj estis lokitaj ĝustamaniere inter ili, la makabeoj jam penetris la orientan parton de la valo kaj disvastiĝis tie. Sed tie ili estis haltigitaj de la kontraŭuloj kaj baldaŭ la lukto estis en plena vervo kaj ambaŭ partioj levis siajn batalektriojn.

La makabeoj sciis nenion pri la helpaj taĉmentoj venintaj kaj surpriziĝis pri la superforto renkontanta ilin. Sed ili luktis kun ĉiom da tiu mortmaltimo kaj fanatika sovaĝeco, kiuj karakterizis ilin. Se ne estus veninta helpe Herodo kun siaj novaj nelacaj trupoj, nenio malhelpus ilin venki kaj eble ekstermi la tutan armeon enfermitan en la valo. Nun finiĝis alie kaj ili trovis sin atakataj de soldatoj, kiuj kuris kontraŭ ilin en nombro ŝajne senlima, kiom ajn granda. La mortado ambaŭflanke estis signifa, sed inter la makabeoj multe pli fatala, ĉar nun ili estis tiel malsuperaj al la kontraŭuloj.

Herodo mem luktis unualinie, kiel li ĉiam faris. Sed ŝajnis, ke li faras tion sen sia kutima batalemo. Kaj se iu emis al bataloj, li faris tion. Sed ne ĉifoje, ŝajnis. Li ŝajnis senverva kaj malbonhumora, ne tia kiel aliam. Li batalis nur kiel ordina-

ra soldato, oni povus diri, kaj sen tiu furiozo, kiu kutimis karakterizi lin. Estis tre malsimile al li.

Tamen, la batalo disvolviĝis tiel, kiel ĝi devis pro ilia supernombro en trupoj. La makabeoj havis tiom da mortigitoj kaj ilia lukto estis tiel senespera, ke ili, malgraŭ sia granda kuraĝo, devus kompreni tion. Kaj rimarkiĝis pli kaj pli, ke ili tion faras, malgraŭ tio, ke ili ne volas kapitulaci.

Ĉe la fino de la batalo okazis, ke malgranda gracila knabo aperis inter la plenkreskintoj, inter la makabeoj, armita per glavo certe malpli granda ol alies, sed tamen tro granda kaj peza por li. Tio aspektis stranga.

Sed eĉ pli strange estis, ke Herodo, kiam li ekvidis la knabon, iris rekte kontraŭ lin kaj frapis lin kolere per sia glavo sur la maldekstran ŝultron tra la brusto ĝis la koro.

Tiuj, kiuj troviĝis proksime, surpriziĝis pro la intenso, kun kiu li mortigis la knabon, kiu ja estis nur infano kaj ne taŭga kontraŭulo por Herodo. Sed kompreneble la knabo ja estis militanto kiel la aliaj kaj devis akcepti la riskon morti kiel ĉiuj el ili. Mortinta li aspektis tre senhelpa kun sia malgranda magra vizaĝo kaj li estis tute sangmakulita sur la tuta korpo, sed ne sur la vizaĝo. Strange, ke ili tenis infanojn inter siaj trupoj. Tio neniam antaŭe okazis.

Poste Herodo ŝajnis sufiĉe ekzaltita kaj spiradis forte. Li rapide okulumis la kuŝantan knabon, sed poste ne rigardis en tiu direkto.

Kiam tio okazis, la batalo fakte jam finiĝis. La makabeoj grandparte retiriĝis tra la pasejo kaj nur malgranda taĉmento restis por ŝirmi la returniron. Ankaŭ tiuj lastaj poste sin savis fuĝante.

La kadavroj restis kuŝantaj sur la batalkampo, kie okazis ilia malvenko, kaj inter ili estis tiu de la knabo.

La soldatoj de Herodo zorgis pri siaj vunditoj, sed tiujn de la malamiko ili lasis, ĉar tia ĉiam estis la moro en ambaŭ partioj. Poste ili retirigis al siaj bivakaj fajroj, kolektiĝis ĉirkaŭ ili.

La tago proksimiĝis al sia fino. La soldatoj eksidis kaj purigis siajn armilojn. Ankaŭ Herodo purigis sian glavon.

Post tio venis la krepusko.

5

Mariamne informiĝis pri la afero per tio, ke makabeo, kiu ĉeestis kaj vidis la okazaĵon, venis el la montoj kaj kuraĝis eniri Jerusalemon por lasi flegi siajn vundojn. Sed tiu, kiu rakontis al ŝi, estis la maljuna servistino el la domo de ŝiaj parencoj.

Ŝi ploris du tagojn.

6

Daŭris longe antaŭ ol Herodo revenis en Jerusalemon. Li supozeble ne tre volonte revenis. Sed Mariamne ne konsciis pri tempo, ŝi nur funebris la morton de sia parenceto kaj la manieron, en kiu li mortis. Ŝi estis kreita tia, ke ŝi ne povis kompreni, kiel io tia povis okazi. Tutajn tagojn ŝi sidis rigardante antaŭ si kun senesprimaj okuloj, penante kompreni, kio okazis. Kaj kompreni, kiel tiel povas esti. Kaj ĉiam, ĉiam ŝi vidis antaŭ si la malgrandan duran knabon, lin, kiu kuris rekte inter ŝiajn brakojn, kiam li la unuan fojon ŝin vidis, kiam ŝi eniris ilian domon.

Lia vizaĝo estis tiel pala kaj lia rigardo tiel riproĉa, ŝi opiniis.

Ĉu ŝi kulpas lian morton? Lian fuĝon al la montaro kaj per tio lian morton? Pro tio, ke ŝi fariĝis edzino de la malamata Herodo? Eble tio afliktis lin tiom, ke li fuĝis for de ĉio.

Pri tio ŝi cerbumis.

Kaj pri tio, kial Herodo mortigis la knabon. Kaj kial li mortigis lin en tiel furioza maniero, kiel estis informate, tio estis ja nekomprenebla. Ĉu tio eble povus dependi de tio, ke li neniam iun pardonas, eĉ ne infanon. Tia li estas, tion ŝi sciis, kaj tion li kelkfoje mem rekonis. Eble li repentis la mildecon, kiun li montris liberigante lin kaj koleriĝis, kiam li vidis lin tie inter la malamikoj.

Sed eĉ se tiel, ŝi ja ne estis malpli kulpa. Ŝi estis kulpa ĉiukaze.

Kaj eble ... Eble ... Sed tio tamen ne estus ebla, ĉu?

Ĉu povus do la ago de Herodo esti venĝo pro tio, ke ŝi ne amas lin? Ne sufiĉe, ne tiel, kiel oni volus esti amata.

Ne, tio ja tamen ne estas ebla, ĉu?

Se tiel estus, tiam ŝi ja kulpus en maniero, kiu ...

Ne, ŝi nenion povis kompreni. Nenion.

Sed ŝi ja apartenis al tiuj homoj, kiuj ĉion riproĉas al si.

Kiam Herodo fine revenis en Jerusalemon, li tuj komprenis, ke Mariamne ĉion scias. Ŝia vizaĝo estis ŝanĝita de la funebro sed, sufiĉe strange, en tia maniero, ke ŝi ŝajnis pli bela ol antaŭe. Ĝi estis eĉ pli pala ol antaŭe, kvazaŭ diafana, ŝia funebro tralumis ĝin elinterne kaj faris ĝin eĉ pli nemateria.

Ŝi ne plu havis larmojn, antaŭlonge ŝiaj okuloj perdis la kapablon plori, sed ili estis plenaj de tiu funebro, kiun ili devus priplori. Strange, ili fariĝis eĉ pli mildaj de tio, kvazaŭ eĉ pli varmaj, dum kontraŭe alies okuloj kaj rigardo verŝajne duriĝus post ties sufero. Sed en ŝi la sufero ŝajnis aldoni eĉ pli da mildeco.

Kiam Herodo vidis ŝin ŝanĝita en tiu maniero kaj komprenis, kion li faris al ŝi, komprenis, kion ŝi devis suferi pro li, li falis genue ĉe ŝiaj piedoj kun ĝemado sur siaj lipoj, angorŝvito gutiĝis sur lia frunto kaj li etendis siajn brakojn al ŝi sed sen tuŝi ŝin, kaj rigardis ŝin pete per siaj sangostriaj okuloj. Sen vortoj li petis al ŝi pardonon pro sia malico, pro tio, ke li estas, kia li estas. Al ŝi, kiu povis pardoni ĉion.

Kaj per sia malvarmeta mano ŝi karesis lian fronton, forkaresis la angorŝviton de ĝi, de la frunto de la hombesto, la

malsekajn nigreruĝajn harojn de ĝi, ĝis liaj lipoj ĉesis tremi kaj lia rigardo fariĝis malpli ekscitita kaj sovaĝa kaj ŝajnis, ke li iel paciĝis.

Ŝi lasis lin finplori ĉe si kaj ŝi ankaŭ lasis lin veni al ŝi, por ke ŝi pacigu lian maltrankvilon kaj pelan instinkton. Ŝi klopodis esti kiel antaŭe, kiel ajn malfacile por ŝi. Eble ŝi tiel povos konservi iom el sia influo sur lin, ŝi pensis. Se ŝi povos konservi tion, tio estos, ĉar li trovos kontentiĝon ĉe ŝi, tion ŝi ja sciis. Tial ŝi malgraŭ ĉio volis, ke li serĉu ŝian sinon. Estis ja ankaŭ tiel, ke ŝi bezonis lin, kiom ajn ŝi klopodis eviti pensojn pri tio. Li vekis ŝian sensvivon kaj unu fojon vekita ĝi daŭrigis postuli sian kontentiĝon. Sed ŝiaj sensoj ne postulis tute la samon kiel liaj. Kaj liajn postulojn ŝi ĉiam plu tute ne povis kontentigi.

Mirigis ŝin, ke ŝi post tio, kio okazis, povis percepti ian ajn plezuron, kiam li serĉis ŝian sinon. Sed ŝi perceptas tion, ŝi devis konfesi tion. Ŝi riproĉis sin mem pro tio. Kiel ŝi sin riproĉis pro ĉio. Kaj en la mallumo ŝi vidis la palan vizaĝon de la knabeto kun la malgajaj okuloj, kiuj eĉ pli grandiĝis nun post lia morto.

Herodo vere nun trankviliĝis por kelka tempo, tion ŝi efikis, kaj oni ne aŭdis, ke io aparte indigniga okazis, almenaŭ ne en Jerusalemo. Ne laŭ ŝia scio. Sed ŝiaj kontaktoj kun la ekstera mondo ja ne estis multaj. Ili plejparte konsistis el tio, ke la maljuna servistino ŝin kelkfoje vizitis. La familio ne sciis pri ŝiaj venoj, se ili sciis, ili estus tre koleraj kaj tio certe signifus certan danĝeron por ŝi. Ŝi tamen venis. Ĉar malgraŭ tio, ke ŝi neniam per vortoj menciis tion, ŝi ekŝatis Mariamne dum la mallonga tempo, kiam ŝi loĝis en ilia domo. Kaj Mariamne ekŝatis ŝin. La maljunulino havis sulkan, severan viza-

ĝon, sed same severa kiel la aspekto ŝi kredeble ne estis. Estis nur tiel, ke ŝi neniam ridetis. Kial ŝi ne faris tion, oni ne sciis, verŝajne neniu sciis. Sed kelkaj homoj ja neniam faras tion, precipe maljunuloj, kiuj traspertis la tutan vivon.

Ŝi rakontis ion pri tio, kio okazis en la domo de la parencoj kaj kion ili diris pri la okazintaĵoj en Jerusalemo kaj en la provinco. Ŝi propre estis neparolema kaj ne tiom por paroli ŝi venis, kiom por sidi dum kelka tempo ĉe Mariamne.

Kaj Mariamne tre ĝojis kaj estis dankema, ĉar ŝi venis. Parte ĉar ŝi volonte revidis ŝin kaj parte ĉar ŝi tiamaniere iom kontaktiĝis kun la mondo kaj povis iom demandi pri siaj parencoj, kiujn ŝi tiom ŝatis. Malgraŭ tio, ke ili ŝin malamamis. Sed tion ŝi ne volis kredi.

Siajn promenojn en la urbo kaj ofte ekster ĝi ŝi daŭrigis kiel antaŭe. Ne estis kutime, ke virino movis sin tiel, sed por ŝi tio estis natura kaj ŝi havis kutimon al tio. Ŝi ja ne naskiĝis en Jerusalemo, sed en tre malgranda urbeto, kiu apartenis al ŝia familio, tiu, kiu ne plu ekzistis. Ankaŭ la urbo ne plu ekzistis. Kiam ŝi laste ĝin vidis, ĝi estis nur kelkaj fumantaj ruinoj.

Dum tiuj promenoj ŝi ja renkontis multajn homojn, sed ili ja estis fremduloj kaj ŝi ne intime rilatis kun ili. Tamen ofte okazis, ke ili ŝin rekonis kaj ridetis al ŝi, eble ŝi sukcesis ion akiri por iu parenco ilia. Kaj la ŝanĝo nun okazinta, kiu sugestis, ke ĉiuj vivas en pli milda epoko, ĝin ili plene atribuis al ŝi. Kaj tial ili ridetis al ŝi, tuj kiam ili vidis kaj rekonis ŝin kaj ĉiam pli multaj genuis antaŭ ŝi kaj kisis ŝian mantelborderon.

Mariamne la arĝente vestita.

Sed ili miris pri tio, kiel ŝi ŝanĝiĝis. De kio tio povas dependi?

Kaj pri tio, ke ŝi ne plu ridetas al ili kiel antaŭe.

7

La pliboniĝanta stato en la lando kaj la pli trankvila rilato linter la du en la palaco ja ne povis daŭri kiom ajn longe.

Herodo komencis denove ĉiam pli maltrankviliĝi, denove fariĝis simila al si, oni eble povus diri. Li forglitis en sian mondon, fermita en si kaj suspektema, kaj ŝi rimarkis, ke ŝi perdas sian potencon super li.

Kaj ŝi sciis, de kio tio dependas. Ĉifoje ŝi cetere eksciis tion de li mem.

Fine li denove foriris al militado, iris al la trupoj inter la montoj, kie li ĉiam sentis sin plej komforta.

Mariamne ne tre malĝojis pro tio, ĉar lastatempe fariĝadis por ŝi ĉiam pli malfacile. Li jam komencis malkaŝe riproĉi ŝin, ke ŝi ne amas lin, konstante paroli pri tio. Antaŭe li ja klopodis kaŝi tion, kaŝi sian humiliĝon, kiel li nomis ĝin, ne rekonu ĝin, teni ĉion en si mem. Sed nun li male rekte diris tion, senkurbe kontraŭ ŝia vizaĝo. Ke li tre bone scias, ke ŝi ne amas lin, ke li rimarkas tion ĉiufoje, kiam ili kunestas, kaj ke ŝi mem scias tion same bone kiel li kaj montras tion eĉ tro klare, precipe kiam ŝi afektas deziron pri li, ŝajnigas sin plena de sekspostulemo malgraŭ tio, ke ŝi tute ne estas, sentas absolute nenion, ŝajnigas ardon kaj fajron, kiujn ŝi neniam kapablas senti, neniam trasperti en sia malvarmeta korpo, en

tiu pala kaj suferanta korpo, kie ĉio estas malvarmeta, manoj, sino, koro, ĉio.

Ŝi rigardis lin per siaj malgajaj, malhelaj okuloj, tute ne forturnante sian sinceran rigardon, kaj kiam li ne plu povis elteni ĝin, li forrapidis, forkuregis de ŝi kaj liaj propraj sangostriaj okuloj estis tute sovaĝaj, kiam li ekkaŭris sur benko en alia ĉambro kun bateganta koro.

Tiel ili disiris. Antaŭ ol li foriris al la montoj.

8

Por Mariamne komenciĝis nun en ŝia soleco kvieta tempo. Ŝi komencis mem vivi, ŝajnis kvazaŭ ŝi dumlonge ne faris tion. Ŝi mergiĝis en sin mem, en sian propran esencon, sed tute sen sinatento. Ŝi nur estis, vere estis kaj io, ŝi ne sciis kio, tiriĝis tra ŝia animo kaj ŝia fragila, malvarmeta korpo kiel vento tra arbo.

Fakte ŝi tre malmulte konis sin mem. Estis strange, kiel malmulte ŝi sciis pri si mem, estante tiel neordinara kaj, oni supozeble povas diri, aparta homo. Kaj kiel malmulte ŝi priatentis tion. Aŭ prefere oni diru, kiel malmulte ŝi priatentus tion, se tio envenus ŝian kapon.

Eble estas multe da vero en tio, ke ŝi estis kvazaŭ arbo. Ĉar arbo ja scias nenion pri si mem. Kaj arbo estas sekreto. Eble granda sekreto. Sed ĝi mem nenion scias pri tio. Ĝi estas sekreto ankaŭ por si mem.

Oni povas ankaŭ ekpensi pri tio, kial ŝi ne bezonis templon.

Pri la arboj kaj la floroj kaj la belaj ŝtonoj, kiujn oni povas trovi ĉe la strando, ja estas tute same.

Kiel oni povus konstrui templon por ili?

Ankaŭ ŝi ne bezonis templon.

Ŝi estis kiel la arboj. La vento estas ilia diservo, kiu pleni-

gas ilin kaj kiun ili aŭskultas kelkfoje, ne ĉiam, sed kelkiam. Interne en si mem ili celebras sian diservon. Tiel estas por ili.

Supozeble ŝi tion aŭskultis dum tiu kvieta, soleca tempo.

Ŝi promenis en tiu parto de la palaco, kiun ŝi klopodis fari hejmo. Ĝi ne tre similis veran hejmon, tion oni ne povas diri. Ŝia vera hejmo ne plu ekzistis, iam ĝi troviĝis en tiu malgranda urbeto, kiu nun estas ruina. Ĝi estis hela kaj feliĉa hejmo kaj ŝi rememoris tion kun granda ĝojo.

Ŝi rememoris sian patrinon kaj sian patron kaj siajn du fratinojn, ili ĉiuj forpasis. Ŝi estis sola. Sed ŝi ja havis siajn parencojn en Jerusalemo, kvankam oni diris, ke ili ŝin malamas. Sed ili ja tamen estis ŝiaj parencoj, ŝi do ja ne estis tute sola.

Kelkajn fojojn venis la maljuna servistino por ŝin viziti kaj tiam ŝi parolis pri ili. Sed neniam pri ilia malamo kontraŭ ŝi, tion ŝi ne volis mencii. Ŝi ankaŭ nenion malbonan diris pri Herodo, kvankam ŝi ja certe multon sciis pri li. Cetere ŝi neniam ion malbonan diris pri iu ajn. Sed ŝi pli ofte vizitis dum ĉi tiu tempo, kiam li ne estis tie.

Foje, kiam Mariamne promenis en la urbo, ŝi venis al puto, kie virinoj prenadis akvon. Ĝi troviĝis sur malgranda placo kaj certe virinoj prenadis akvon tie jam de la mondestiĝo. La placo kaj la puto certe ambaŭ estis tre malnovaj, kiel ĉio en Jerusalemo.

Kiam ŝi nun preterpasis tie, ŝi ekvidis, ke unu el la virinoj estas ŝia proksima parenco, kuzino de ŝi, samaĝa kiel ŝi. Ŝi rapidis manetende al ŝi kaj ŝiaj lipoj jam malfermiĝis por eldiri ŝian nomon. Sed la juna virino sin forturnis kaj, ĉar ŝia kruĉo jam estis plena, ŝi foriris de tie portante ĝin sur sia kapo

sen retrorigardo, en la mallarĝan straton kondukantan al ilia hejmo.

Mariamne staris rigardante post ŝi.

Kiam Herodo revenis, li montris mornan humoron. Li ŝin evitis kaj kiam ŝi demandis, kiel li fartis dum la tempo inter la montoj, li respondis, ke li fartis bone kaj ke multajn el ŝia ribelema familio li mortigis, se ŝi eventuale pensas pri tiaj aferoj.

Pli poste li sen aparta kaŭzo menciis, ke li havis aliajn virinojn tie, virinojn, kiu akompanis la trupojn, kaj kaptitajn makabeajn virinojn, ili havis tute alian karakteron kvankam samfamiliaj.

Mariamne nenion respondis.

Li estis amara pro tio, ke ŝi nenion respondis. Ĉar ŝajnis, kvazaŭ tio ne tre multe ŝin tuŝus. Sed li nenion montris.

Li ne nur estis amara, li ankaŭ estis elreviĝinta. Li atendis ion alian, ke ŝi montru indignon pro tio, kion li diris.

Ke la virinoj, kiujn li ekkonis, nur naŭzis lin, tion li ne menciis. Tion li ne volis rekoni eĉ al si mem.

Cetere ne estis tiel, ke ili nur naŭzis lin. Ili samtempe ankaŭ kontentigis lin kaj eble ĝuste pro tio, ke ili estis tiel mal-similaj al Mariamne. Ŝi, kiun li amis.

Li havis avidon sperti ion tute alian ol ŝin, ol ŝian puron. Ankaŭ la tro pura povas tedi.

Sed ja ŝin li amis.

Sed la silento de Mariamne, tio, ke ŝi nenion respondis, venis el tio, ke ŝi kompreneble suferis pro tio, ke li havis aliajn virinojn, kompreneble tio turmentis ŝin, sed ŝi ja nenion alian povis atendi. Ŝi ne povis riproĉi lin pro tio. Tial ŝi ankaŭ ne faris tion.

Nun li neniam plu serĉis ŝian brakumon, ne plu venis proksime al ŝi. Kaj ja estis nature, ke ŝi tamen iom suferis pro tio, sentis mankon de la sama kontentiĝo, al kiu li ŝin kutimigis, estus malvero, se ŝi tion neus, spite al ĉio en li, kio vekis ŝian naŭzon kaj abomenon.

Ŝi ankaŭ pensis, ke tiu afero kun la virinoj povus esti antaŭsigno, ke li eble reprenos sian malnovan vivmanieron, kaj ŝi havis grandan maltrankvilon pro tio. Ke ŝi mem perdis ĉian potencon super li, estis ja evidente. Kio nun okazos?

Baldaŭ montriĝis, ke ŝia maltrankvilo havis kaŭzon.

Famoj cirkulis pri pli dura regado, denove duriĝonta tempo. Pri viroj kaptitaj aŭ malaperintaj, trenitaj el siaj hejmoj, de sia familio, kaj poste ne montrantaj vivsignon. La teruro denove disvastiĝis en Jerusalemo.

La prizonkarceroj denove pleniĝis kaj oni ja ne sciis, kio okazas tie, sed oni eble povus diveni. Ĉiun tagon Mariamne vivis en timo kaj malĝojo kaj apenaŭ komprenis, kiel elteni. Ŝi ankaŭ tre maltrankvilis pri tio, ĉu malbono okazis al ŝiaj parencoj, ĉu oni penetris ankaŭ en ilian domon. Sed tio ne okazis, ŝi poste eksciis. Certe oni farus tion, se viroj estus en la domo, sed ne plu estis. Nur virinoj restadis ankoraŭ.

Ankaŭ io alia okazis en la palaco. Herodo ja nun kutimiĝis al alia speco de virinoj, al pli da virinoj, kiel pli frue, kaj liaj proksimaj subuloj denove venigis tiajn en la palacon, ŝminkitajn virinojn, putinojn kaj kunkubinojn, tute kiel antaŭe. Sed li faris tion ne nur pro sia seksdeziro, sed ankaŭ por humiligi, ofendi kaj malaltigi ŝin, kiun li amis kaj kiu ne amis lin, faris tion pro nura malico. Ĉe li eĉ la amo estis malica.

Sed ne estis facile malaltigi Mariamne. Ŝi havis ion inter-

ne, jes ankaŭ ĉirkaŭ si, ion neklarigeblan, kio ŝin faris neatingebla. Ŝi promenis en tiu domo de malvirtoj kvazaŭ la ĉirkaŭantaj aferoj ŝin ne tuŝus. Ja kompreneble tio ŝin tuŝis, sed humiligita kaj malaltigita ŝi ne sentis sin. Ion tian ŝi entute ne povis senti.

Unufoje li superŝutis ŝin per senbridaj riproĉoj pro tio, ke ŝi toleras tion, ke ŝi ne lasas sin influi de tio, kio okazas ĉirkaŭ ŝi, kaj pro tio, ke ŝi ne akuzas lin pro lia malvirta vivo.

Kial ŝi ne faras tion! Kiel ŝi povas ne fari! Kiel...!

Sed meze dum sia sovaĝa parolado li subite silentiĝis kaj forturnis sian sangostrian rigardon kaj ŝi ne bezonis respondi.

Li ŝin forlasis kaj daŭris longe antaŭ ol ili renkontiĝis. Oni fakte povas diri, ke tiu fojo estis ilia lasta renkontiĝo. Se oni ne kalkulas tiun fojon, kiam ŝi estis mortanta, kiam li tro malfruis, ĉar ŝi preskaŭ jam mortis.

Daŭris tamen ankoraŭ longe ĝis tiam, sed ili evitadis unu la alian.

Inter Mariamne kaj tiuj virinoj estis cetere bona rilato, oni povas diri. Ili ja kulpis pri nenio, ŝi ja ne povis ilin akuzi. Tion ŝi ankaŭ ne faris. Kaj ankaŭ ili ne malrespektis ŝin. Eble ŝia karaktero ne povis, je certa grado, ne impresi ankaŭ ilin. Kaj eble ili ŝin kompatis. Opiniis ŝin pli kompatinda ol sin mem.

Cetere ili sin tenis en aliaj partoj de la palaco, dum ŝi mem loĝis en tiu parto, kiun ŝi ekipis kiel iaspecan hejmon. Pri ĝi ŝi povis ĉiam mem mastri.

Sed unu el ili, kaptita makabea virino, kiu lokiĝis tie pro ia fortikmembra beleco, elverŝis foje, kiam ili renkontiĝis, sian senmezuran malamon kaj malestimon sur ŝin.

—Mi estas kaptitino, ŝi kriis, devigita min doni al li, tiu honta tirano, tiu abomena idumido. Sed vi vin donis al li propravole kaj pro tio vi fariĝis reĝino kaj tion vi verŝajne kredas nobla. Mi ne estas reĝino! Mi estas perfortita malamiko kaj pri tio mi povas fieri. Sed pri kio vi povas fieri! Ĉu vi povas diri! Fi!

Herodo eksciis tion de la aliaj virinoj, eksciis, kiel ŝi kondukis kontraŭ Mariamne. Li mem ŝin punis kaj kun sia tuta konata perfortemo, kiam li koleris, li ŝin draŝis. Eĉ ne flustron ŝi ellasis. Sed li tamen lasis ŝin resti en la palaco, kvankam ĉiuj kredis, ke li ne faros tion. Ĉar li ŝatis, ke ŝi neniam submetas sin, ke ŝi neniam cedas, ke li ĉiam devas perforti ŝin.

Malgraŭ ĉio li do ne toleris, ke iu mistraktu Mariamne.

La maljuna servistino dum longa tempo ne venis kaj Mariamne sin demandis pro kio. Tio ne laŭ neceso ion signifus, kelkfoje daŭris iom longe inter la fojoj. Ŝi pensis, ke ŝi certe venos. Certe ŝi baldaŭ venos.

Sed ŝi ne venis.

Nun jam pasis semajnoj, jes, pluraj semajnoj. Mariamne vere maltrankviliĝis. Kio estas la kaŭzo? Kaj neniun ŝi povis demandi, al kiu ŝi povus sin turni?

Ĉu la familio eksciis, ke la maljunulino ŝin vizitis kaj nun malhelpas ŝin plu fari tion? Aŭ kio povus esti la kaŭzo? Ŝi ne komprenis.

Tiam ŝi fine informiĝis de unu el la putinoj en la palaco, ke tiu maljunulino, kiu kutimis veni, ne plu estas. Nenecese do, ke ŝi tiel atendas.

Mariamne tre agitiĝis. Demandis, kiel ŝi povas scii tion. Jes, ŝi aŭdis tion.

Ĉu ŝi volas diri, ke ŝi mortis? Tion ŝi ne tute certe scias, sed ŝi estas for kaj tial ŝi kredeble mortis, ili kutime mortas.

De alia flanko Mariamne poste ricevis konfirmon, ke tiel vere okazis. Ke ŝi vere mortis. Kaj ke ŝi estis forviŝita, ĉar Herodo ŝin suspektis mesaĝulino inter Mariamne kaj la makabeoj, al kiuj apartenis ŝia familio. Ke li do eĉ suspektis Mariamne pri rilatoj kun liaj malamikoj. Ŝi informiĝis pri tiu danĝera afero.

Tio estis tro absurda. Ŝi povis nenion kompreni.

Ne eblas, ke li povu ion tian kredi.

Estis por ŝi ankaŭ vere malfacile kompreni, ke la maljunulino mortis. Ŝi profunde ŝin funebris, ĉar ŝi tre ŝatis ŝin, sed ĉu ŝi vere iam diris tion al ŝi? Ŝi ne povis per sia penso kapti, ke ŝi neniam plu venos. La maljunulino ĝis tiam estis la sola homo intima kun ŝi, nun ŝi estis tute sola.

Dum tutaj tagoj ŝi sidis pensante pri ŝi. Pri ŝia maljuna sulka vizaĝo, kiu aspektis tiel severa malgraŭ tio, ke ŝi ne estis. Ne, ŝi ne estis severa. Estis nur tiel, ke ŝi neniam ridetis. Kial ŝi ne faris tion, de kio tio dependas, neniuj sciis.

Kaj nun ŝi estis for.

Jes, estis vero, ke li suspektis ŝin rilati kun la makabeoj, liaj malamikoj. Ke la multaj vizitoj de la maljunulino ĉe ŝi igis en li la suspekton. Tial li nun forpasigis ŝin.

Sed la danĝero ne pasis, li diris al si.

Kiel multaj perforteme vivantaj homoj li tre timis pri sia vivo. malgraŭ tio, ke li multajn aliajn homojn mortigis, li havis timon morti mem. Li ne timis morton en batalo, dum tiu ekscitiĝo, kiu regas en batalo, en tia situacio troviĝis eĉ ne grajno da timo en li. Sed timo antaŭ la morto pro malsano,

morto elinterne, dum rabas la vivon nevidebla malamiko, kiun oni ne konas. Kaj timo esti murdita, trapikita de malantaŭe per ponardo sub la skapolo, sub la maldekstra skapolo, eble tio lin iam frapos, tio estas tre imagebla, tio povos okazi kiam ajn.

Se konspiro ekzistas kontraŭ lia vivo, se oni imagus tion, kiel valore estus por la konspirantoj, se unu el ili troviĝus proksime de li, tute sen suspekto, ĉiam troviĝus proksime, en lia propra domo. Ĉu li ne devas pensi pri tio?

Ĉu li kredis tion? Ĉu li vere kredis tion? Ne, tion li kredible tamen ne faris. Li estis tre suspektema, sed tiom suspektema, ke li kredus, ke Mariamne volas lin mortigi, ne, tiom suspektema li ja tamen ne estus. Ke ŝi povus konspiri kontraŭ lia vivo? Ne, tio ja tamen ne estus ebla?

Sed li sukcesis konvinki sin, ke jes.

Li tre zorge kaŝis antaŭ si mem, kio propre movas liajn pensojn, kiuj nun okupis lin ĉiam pli. Kaj eĉ malpli li sciis, aŭ pli ĝuste, rekonis al si mem tiujn malklarajn instinktojn, kiuj nun ekmoviĝis funde de lia animo. Malsupre en la feĉo de lia animo.

La popolo ankoraŭ same multe amis Mariamne, almenaŭ la plimulto. Kiam ŝi venis promenanta sur la stratoj, kio tamen ne okazis tiel ofte nun kiel antaŭe, ili daŭre montris, kiom kara ili tenas ŝin. Malgraŭ tio, ke ŝi tute ne povis plu ion fari por ili, absolute nenion povis eldevigi. Tamen ili ŝin amis. Malgraŭ tio, ke ŝi ne plu ridetis al ili, neniam plu ridetos al ili. Ili sciis, kiel ŝi suferas, kial ŝi ĉiam aspektas malgaja, ili ĉion sciis. Ili sciis, kial ŝi ŝanĝiĝis, kial ŝi ne plu similas al si. Sed ili

tamen ŝin amis. Kial ŝi neniam plu povas rideti, neniam plu ridetos al ili. Ili tamen ŝin amis.

Mariamne la arĝentvestita.

Li nun estis decidiĝanta, ĉu li plu povos elteni tion, ke ŝi vivas, ke ŝi ne mortis. Tio estis malfacila por li, sed li ja devis decidiĝi, fine fari decidon.

Dumlonge li ŝin ne vidis. Li preskaŭ komencis rigardi ŝin kiel fremdan virinon. Fremdan virinon, kiu konstante troviĝas en lia proksimeco, en lia propra domo. Li devis pensi pri tio. Malgraŭ tio, ke li neniam ŝin vidas, ŝi ĉiam konstante troviĝas tie. Li devas tion ne forgesi. Kaj eble ŝi konstante sin tenas en sekreta rilato kun liaj malamikoj. Li devas decidiĝi. Li ne povas plu prokrasti la decidon. Ne plu. Eĉ ne unu tagon plu. Eĉ ne unu. Li devas fari decidon.

Kaj tio, ke li dumlonge ne ŝin vidis, faciligis al li fari decidon.

Li do soldis viron, kiu ŝin murdu. Kaj farinte tion, konsentinte kun la viro, li sentis sin pli bonhumora.

Li sentis sin pli trankvila nun, kiam li fine decidiĝis.

La soldita murdanto estis viro, kiun li ofte antaŭe uzis por similaj taskoj. Similaj? Similaj?

Li estis alta fortika homo kiel li mem. Kial li estis? Kial li similis al li mem?

Kial li uzis ĝuste lin? Kial iun, kiu similas al li mem? Troviĝis ja multaj aliaj. Kial li ne uzis iun el ili? Kial ĝuste lin? Lin, kiu similas al li mem?

Nu jes, li ja kutimas volonte lin uzi. Sed troviĝis ja ankaŭ aliaj. Kial ĝuste tiun? Lin, kiu similas al li mem?

Li rajdis ekster Jerusalemon, relative longan distancon. Li rajdis tute malrapide, ĉar li ne havis difinitan celon. Estis bela tago, aŭtuna tago. Kun klara aero kaj sen nuboj. La ĉielo estis serena, tute serena. La suno montris la horon. Li ofte rigardis la ĉielon.

Sen aparta kaŭzo, laŭvide, li turnis la ĉevalon, turnis reen al Jerusalemo. Kaj post mallonge — komence ne, sed post mallonge — li komencis rapidigi sian rajdon. Ne tre rapide, ne kun granda diferenco, sed tamen pli rapide. Kaj kiam ne restis longa distanco ĝis la urbopordo, li komencis rajdi iom rapide, jes, tre rapide, pelis la ĉevalon, kiom li povis.

Veninte al la palaco, al la pordo de la palaco, li nur ĵetis la bridrimenojn, nur forlasis la ĉevalon kaj rapidis supren laŭ la ŝtuparo.

Kiam li envenis ŝian ĉambron, li ŝin trovis tie kuŝanta kaj sangata, kun du vundoj, unu en la brusto kaj unu en la kolo. Ŝi ankoraŭ vivis kaj spiris, kvankam preskaŭ nerimarkeble. La okuloj estis fermitaj, sed kiam ŝi rimarkis lian ĉeeston, ŝi malfermis ilin kaj rigardis lin.

—Amata, amata, li flustris kaj sin klinis super ŝi.

—Amata, amata...

Ĉu ŝi lin aŭdis? Aŭ ĉu ŝi lin ne aŭdis?

Neniam li tion ekscios.

Ŝi ne povis paroli kaj ŝi senhelpe movis sian manon. Poste ŝi metis ĝin en lian, sian mallarĝan maneton en lian.

Ĉu ŝi ne scias...? Ĉu ŝi ne scias...? Jes, ŝi ja devas...

Aŭ ĉu ŝi scias, sed tamen faris tiel...?

Tamen tiel...?

Li kaŭriĝis, staris tie surgenu kaj ne komprenis kion fari, tute ne kion fari.

Amata, nur tion li povis diri.

Kaj denove ŝi fermis la okulojn. Ŝi spiris iom pli profunde kaj post tio ŝi mortis. Tiam li komprenis, ke ŝi mortis.

Li sin klinis super ŝi.

—Amata, amata, li ripetis denove kaj refoje.

Sed ŝi ne aŭdis tion.

Daŭris iom, sed ne tre longe, antaŭ ol li kaptis ŝian murdinton. Li sin ĵetis kontraŭ lin en plena furiozo, ponardis lin per sennombraj furiozaj pikoĵoj, lia tuta granda korpo estis plena de pikvundoj.

Malgraŭ tio, ke la viro estis same forta kaj granda kiel li mem, li eĉ ne iom kontraŭluktis, allasis sin ponardi.

9

Pri la vivo de Herodo post la morto de Mariamne estas rakontate, ke li plu vivis tute kiel antaŭe en malico kaj krueleco, ke neniam ŝanĝo okazis en ĝi. Same kiel la amo ne povis vere ŝanĝi lin, la morto de Mariamne ne faris tion. Nur tuj poste, dum mallonga tempo, li ŝajnis iom pli milda kaj la homoj opiniis, ke estis al ili pli bone dum ioma tempo, por la lasta fojo Mariamne ion eldevegis por ili. Poste ĉio reiris al la malnova ordinario. Poste li resimiliĝis al si.

Jes, propre oni povas diri, ke lia malico kaj krueleco nur des pli kreskis, ju pli li vivis, kaj same lia membloviteco, mem-pufiĝo, lia kredo, ke li estas la plej potenca homo vivanta, ke simila al li ne troviĝas.

Kaj vere lia potenco kreskis, li sukcesis plene venki la makabeon kontraŭstaron en la montaro kaj poste ekstermi ilin tute, almenaŭ ĉiujn makabeojn havantajn ian ajn signifon. Per daŭranta teroro li nelimigite regis popolon tute subpremitan.

Sian malbonmoran vivon li ankaŭ daŭrigis kaj lian sanon subminis fine la senmezuraj diboĉoj, al kiuj li sin dediĉis. Sed ili ne rompintis lin, krom nur korpe kun la tempo, li restis tamen sama, same nevenkebla kaj danĝera por sia ĉirkaŭo kaj por ĉiuj, kiuj kuraĝis altiri lian malamon aŭ eĉ nur lian malkon-

tenton. Li retenis sian tutan forton. Kaj la malamo kontraŭ li retenis sian.

Malgraŭ ĉio li ja estis maljuna homo, kaj tio komenciĝis videbli. Maljunulo kun ne multe da restanta vivo. Li tamen daŭrigis sian senmoderan vivon, nenion ŝanĝis, kontentigis siajn malvirtojn kaj pasiojn, kiel li ĉiam faris.

Sed Mariamne li neniam forgesis.

Foje, kiam li vizitis la templon, kiu nun jam longe staris preta en sia tuta pompo, li ekpensis pri la fojo, kiam li vizitis ĝin kun Mariamne. Pri tio, kiel malmulte ŝi ŝajnis atenti pri ĝi, kiel ŝi ŝajnis preskaŭ indiferenta. Estis strange. Ŝajnis, kvazaŭ ŝi ne bezonus templon.

Strange, li pensis en si.

Kaj poste li komencis ĉirkaŭiri en sia templo, en tiu sanktejo, kiun li konstruis por sia propra singloro, por ke lia nomo vivu post li, por ke li fariĝu senmorta. Kiun li konstruigis tiel kosta kaj bela, eble pli bela ol iu alia templo en la mondo. Li refoje ekĝojis pro ĝia oro kaj kupro, ĝia bronzo kaj arĝento, kaj la brilanta marmoro, kiun li je alta kosto venigis defore el fremda lando. Li ĉirkaŭiris tie per siaj pezaj paŝoj, kiuj fariĝis eĉ pli pezaj nun, kiam li estis maljuna. Li aspektis malsana kaj aĝa, sed tio neniom gravis, ĉar neniu ĉeestis, kiu povus rimarki, li tie ĉirkaŭvagus tute sola. Irinte tie longe kaj trovinte tie ĉion tia, kia ĝi devas esti, li revenis al la palaco, al tiu parto de ĝi, kiun Mariamne faris hejmo. Kiam li estis sola, li ĉiam restadis tie. Kaj li ofte estis, ĉar li ofte sentis tedon pri la homoj, per kiuj li sin ĉirkaŭis.

Estis ja vero, ke Mariamne ne bezonis templon. Ĝi havis sian diservon interne en si, kiun ŝi povis aŭskulti iam ajn. Ĝi estis kiel arbo, kiun la vento plenigas per sia sekreta susuro. Tiel estis ĉe ŝi. Ĝi ne bezonis sanktejon por tio.

Sed Herodo bezonis templon. Ĉar li estis dezerthomo. Kaj en la dezerto li levis templon super si mem.

Ĉu nur super si mem? Ĉu nur por glori sin mem?

Tion mi ne povas respondi. Tion mi ne scias.

Kiam lia malsano akriĝis kaj li komencis suferi de teruraj doloroj, li sin direktis al la lando de siaj prapatroj, al la dezertlando sude de la Maro de l'Morto, por serĉi kuraciĝon kaj faciliĝon tie. Tie estis kelkaj varmegaj fontoj, kiuj laŭdire povis doni sanon kaj novan vivon.

Li neniam antaŭe estis tie kaj li vidis kun miro la landon, de kiu venis lia animo, tiujn dezertajn vastojn kaj sovaĝajn, sangoruĝajn dezertmontojn. Estis lando, kiu povis vekti teruron, sed ankaŭ plenigi la animon per sovaĝa ĝojo. Sed Herodo nun estis tro malsana kaj tro maljuna por vere ĝin sperti.

Lia korpo trovis neniom da sano tie, la sulfurflava akvo de la varmegaj fontoj neniom malakrigis la dolorojn, ĝi nur intensigis ilin, bruligis lin kiel fajro. Ĝi estis lando de morto, ne de vivo.

Kaj li fariĝis nur pli malsana ol iam.

En mizera stato li revenis al Jerusalemo. Lia ŝvelinta korpo estis turmento por li mem kaj por aliaj kun sia forpuŝaodoro.

Kaj lia humoro estis pro la malsano pli malbona ol iam, lia senkonsideremo sin direktis kontraŭ ĉio kaj ĉiuj en lia ĉir-

kaŭaĵo, tiel ke fine preskaŭ neniu kuraĝis proksimiĝi al li. Eĉ liaj malnovaj servistoj ektimis proksimiĝi.

Liaj doloroj estis teruraj. Vere frapis lin tio, kion li plej multe timis, morti elinterne, esti prirabata je la vivo de malamiko, kiun li ne povas vidi, ne scias, kiu li estas.

Kaj malgraŭ tiuj suferoj, tiuj doloroj de kiuj ja nur la morto povus liberigi lin, li havis mortotimon, kiu lin akompanis tage kaj nokte. Ne malplej nokte. Ĉiun nokton li antaŭtimegis.

Malsano kaj mortotimo tamen tute ne malhelpis lin ĉiam plu esti plenigita de si mem, de sia grandiozeco, sia supereco, kiel li estis dum sia tuta vivo. Kaj li estis agitita pro tio, ke homo kia li mortos, tute kiel ordinara homo, kaj en plej naŭza maniero. Li ja devus morti kiel dio, sed tion li ne faris. Oni ne povis diri, ke li faris.

De kiu malsano li suferis, ne estas konate. Oni diris, ke vermoj lin manĝis — kion povu signifi tiu ideo — kaj ke tio okazis pro lia granda malico. Por la popolo ja ne estis malfacile tion kredi.

Li nun vivis preskaŭ sola en sia palaco, ĉar ĉiuj homoj tedis lin, same kiel li tedis ilin. Nur unu servisto ankoraŭ restis. Sed ekster la palaco kompreneble daŭre kiel ĉiam staris multnombre da armitaj viroj por gardi lian vivon. Lia vivo estis tre bone ŝirmata kaj gardata, malgraŭ tio, ke ĉiuj nur esperis lian morton.

10

Je tiu tempo okazis, ke stelo lumiĝis en Oriento per brilo, kiu estis pli forta ol tiu de ĉiuj aliaj. Kaj tri saĝuloj el dezertolando longe for vidis la stelon kaj komprenis ĝian mesaĝon. Kaj ili ekiris por ĝin sekvi. Kaj la stelo haltis super Judolando. Kaj veninte en Jerusalemon ili elserĉis la reĝopalacon kaj diris al la servisto, kiu malfermis al ili:

—Reĝido naskiĝis, infano, kiu estos mastro de la tuta tero. Se ĉi tio estas la reĝopalaco, la infano devas esti naskita ĉi tie.

La servisto ektimis kaj petis ilin atendi ekstere, dum li informos sian mastron. Kun granda timo li transdonis al Herodo iliajn strangajn vortojn, ĉar nun fariĝis tiel, ke ĉio, kio okazis, vekis lian koleron.

Sed Herodo ne koleris. Perpleksigite la servisto trovis, ke anstataŭ kolera li ŝajnas preskaŭ timigita. Ion tian li neniam antaŭe vidis ĉe sia mastro. Ordonite de Herodo li rapidis venigi la tri virojn kaj ilin konduki antaŭ lin.

Herodo vere ektimis. Sed kiam la tri viroj alpaŝis ĝis antaŭ li, li denove trankviliĝis. Ĉar li komprenis, ke tiel malriĉe vestitaj homoj certe ne povas havi ian signifan mesaĝon por transdoni. Li tamen demandis ilin, kial ili venis, kian komision ili havas. Kaj ili ripetis siajn vortojn parolitajn al la servisto, ke infano naskiĝis, kiu estos reĝo de Judolando kaj ankaŭ de la tuta mondo.

Herodo demandis, kiel ili povas scii.

Ili diris, ke ili vidis stelon lumiĝi oriente, potencan stelon, kiu nepre signifas, ke reĝo naskiĝis. Kaj ili sekvis la stelon. Kaj ĝi haltis super Jerusalemo kaj tio devas signifi, ke la infano ĉi tie naskiĝis.

Herodo ridetis interne en si pri ilia naiva babilo kaj diris poste, ke ĉi tie en la palaco neniu infano naskiĝis, sekve pri reĝido ne povas temi.

La tri viroj mire rigardis unu la alian kaj povis nenion respondi je tio.

Sed, ĉar Herodo volonte rigardus la stelon, estis decidite, ke ili revenos malfrue en la vespero, kiam ĝi estos bone videbla.

Reveninte en la vespero ili supreniris al la tegmento de la palaco, kie ili plej bone povis vidi la stelon kaj la tutan ĉielvolbon. Kaj ili montris al Herodo la stelon.

Kun sia maljuna konsumita vizaĝo turnita supren al la noktoĉielo li staris rigardante ĝin. Certe ĝi havas nekutime fortan brilon. Sed la tuta vastega stelĉielo, kiu sin sternis super li, super la reĝopalaco kaj super Judolando kaj super la tuta tero, ŝajnis al li multe pli rimarkinda ol ĝi. Ĝi estis nur parteto de la granda tuto. Kaj certe ĝi baldaŭ estingiĝos. Sed la stelĉielo havanta senfinan dezertecon neniam estingiĝos.

Tiel li pensis en si mem.

Sed la saĝuloj vidis, ke la stelo moviĝas, ke ĝi daŭrigas sian vojon, ke ĝi ankoraŭ ne haltis, kiel ili kredis. Kaj ili haste denove ekvojis kaj eliris en la mallumon por sekvi ĝin.

Sed Herodo restis staranta kaj rigardis la vastegan ĉielvolbon kaj la steloj mergis siajn fridajn lancojn en lian animon.

Kiam la saĝuloj migris jam longe en la nokto de Judeo, ili venis en urbeton, kies nomon ili ne konis. Super ĝi haltis la stelo. Super kaverno ĉe la rando de la urbeto, kien paŝtistoj kutimis konduki sian gregon, sed nun loĝis tie viro kaj virino kun sia infano, kaj super tiu infano la stelo senmoviĝis. Kaj poste komencis forpaliĝi de la ĉielo kaj ne plu videblis, ĉar fariĝis jam mateno.

Tiam la tri viroj komprenis, ke ili atingis sian celon kaj ke la infano estas la reĝo, kiun ili serĉis, al kiu la stelo volis ilin konduki.

Kaj ili proksimiĝis respektoplene al la kaverno kaj la infano, kaj veninte al la enirejo ili genuis kaj restis kvazaŭ adorantaj en siaj malnovaj, eluzitaj, de la suno paligitaj manteloj, sed ne esprimantaj sian adoron per vortoj. Kaj la infano ĵus vekigis, ĉar la suno komencis enlumi, kaj ĝi rigardis ilin per siaj klaraj okuloj.

Kaj ili etendis la donacojn, kiujn ili alportis al la infano.

Ĉar ili estis tre malriĉaj kaj ilia hejmlando estis dezertlando, iliaj donacoj certe estis malgrandiozaj, sed ne pro tio indiferentaj aŭ sensignifaj, kaj ili cetere alportis ilin tute humile.

La unua donis al la infano malgrandan ŝtonon, tre belan ŝtoneton, poluritan tute glata kaj ebena ĉe la marbordo en lia hejmlando, kiu estis dezertlando ĉe la maro.

La dua etendis kardon formitan kiel sceptron, reĝa sceptron, kaj kreskintan en la dezertsablo mem longe for en lia lando.

La tria donis al la infano kruĉon da akvo prenita el fonto en la dezerto de lia hejmlando kaj kiu ja certe devas esti fonto de miraklo, ĉar ĝi elŝprucis el la dezertosablo mem.

Tiuj estis la donacoj, kiujn ili donis al la infano.

Kaj la gepatroj, kiuj ankaŭ estis simplaj homoj kaj ne drolotitaj per kostaj donacoj, multe dankis ilin.

Kaj ankoraŭ unufoje riverencinte antaŭ la infano kaj antaŭ ĝiaj patro kaj patrino, ili foriris de tie kaj ekiris denove hejmen al sia lando.

Sed kiam Herodo aŭdis, ke la infano, pri kiu la tri saĝuloj el Oriento parolis, naskiĝus en tiu urbeto, li sendis ordonon, ke ĉiuj knabetoj tie kaj en la ĉirkaŭa regiono estu mortigitaj, por ke neniu reĝo aperu inter ili.

Estis sendube neeble, ke reĝo naskiĝu tiamaniere, sed por esti certa, li tamen ordonis tiel.

Oni povus ja pensi, ke estante maljuna kaj malsana kiel li, jes, preskaŭ mortanta, li ja povus tediĝi je malicaj agoj kaj devus esti egale al li, kiu fariĝos reĝo post li. Sed tiel ne estis. Neniu alia reĝo ol li devus ekzisti. Neniu alia reĝo krom li sur la tuta tero! Tial li faris tiun ordonon, kiu estis la plej terura, kiun li promulgis.

Tio estis lia lasta malbonfaro. Ĉar nun lia propra morto estis proksima.

Sed kiam la murdoj okazis en la urbeto, la infano kaj ĝiaj gepatroj ne plu estis tie.

11

Herodo estis nun tute sola en la palaco. La lastaj servistoj jam forlasis lin, ne plu eltenis. Kaj, ĉar ili sciis, ke li estas preskaŭ mortanta, ili ne plu timis lin, sed kuraĝis lin forlasi, simple foriri.

En tiu ĉi sia plena soleco li komencis pensi pri Mariamne. Tion li ofte faris, jes, tre ofte. Ŝin li neniam forgesis, ŝin solan, kiun li amis. Estas ja strange, ke tiu lia amo povis teni sin viva dum lia tuta longa malica vivo. Sed tion ĝi faris. Kiel ĝi povis elteni apud lia malico, estis nekompreneble. Sed tiel estis. Oni ne povis nei tion, ke ĝi tion faris.

Kvankam tute ne influante lian vivon, neniel ĝin ŝanĝante.

Ankaŭ la morto de Mariamne neniel ajn ŝanĝis lin, nek lian vivon. Kaj ankaŭ ne tiu fakto, ke li sciis, ke li mem kulpas ĝin, ke li ŝin mortigis, kvankam li dungis alian viron, viron, kiu tre similis al li, por fari tion, por ne bezoni mem fari tion.

Nenio lin ŝanĝis. Nenio iam ajn povos lin ŝanĝi, ĉar li estis dezerthomo. Kaj en lia dezerto troviĝis nenia fonto de miraklo kun freŝa kaj klara akvo, kiun oni povus alporti en kruĉeto por refreŝigi sin kaj fariĝi alia persono ol oni estas.

Nenio simila troviĝis por li.

Li ankaŭ ne estis kiel Mariamne. Ŝi, kiu ne bezonis templon. Ŝi, kiu estis kvazaŭ arbo, kiun la vento plenigas per sia sekreta susuro. Li ankaŭ ne estis kiel ŝi.

Nenio tia troviĝis ĉe li.

Li estis si mem. Li estis Herodo. La granda reĝo Herodo.

Kaj nun li mortos.

Sola kaj forlasita li mortos, kiel ni ĉiuj. Ĉar en la morto ni ĉiuj estas solaj, ĉiuj forlasitaj. Nun li mortos, li, same kiel ni iam mortos.

Kaj estis nokto, tiu tempo, kiun li plej multe timis.

La malsano tiom malfortigis lin, ke li apenaŭ povis sin teni staranta. Sed kuŝante li ne volis morti. Ne, tion li ne volas. Ne tiel li, Herodo, mortos.

Kiam li sentis sian mortohoron proksimiĝi, komprenis, ke la neeviteblo nun okazos, li stariĝis kaj ŝanceliĝe iris antaŭen kaj, preskaŭ falante, apogis sin kontraŭ la muro. Mortiĝante li trenis sin tra la palaco, trenis tra la dezertaj haloj sian pezan, ŝvelintan korpon.

Sed lia sola penso estis ĉe ŝi, ŝi, kiun li amis. En sia mortohoro li pensis pri ŝi, ankoraŭ sopiris pri ŝi.

Mariamne! Mariamne! li vokis per laŭta voĉo.

La malplenaj haloj eĥis pro liaj vokoj.

Ŝanceliĝante kaj apogante sin per la mano kontraŭ la muro li vokis foje kaj refoje:

Mariamne! Mariamne!

Kaj la eĥo kavece redonis la nomon de lia mortinta amatino.

En al mallumo de la morto li trenis sin antaŭen, faris la lastajn paŝojn de sia malica vivo.

Fine li falis kaj restis kuŝanta. Provis denove stariĝi, sed ne povis. Li etendis la brakojn en la mallumon antaŭ si kaj refoje, por la lasta fojo li vokis la nomon de sia amatino:

Mariamne! Mariamne!

Post tio la etenditaj brakoj senpove malleviĝis kaj li estis mortinta.

12

Tiel la granda reĝo Herodo vivis sian vivon ĉi tie sur la tero, tiun tempon, kiu estis donita al li por vivi. Tiel li estis bildo de la homo, kiu plenigas la teron, sed kiu iam estos forviŝita de ĝi, kaj se ni ĝuste komprenas, ne lasos memorajon post si. Tiel li vivis sian vivon.

Mariamne! Mariamne!

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-052-X